

東方呼聲 VOĈOJ EL ORIENTO

Aperas Ĉiumonate
Adreso: P. O. Box 1732,
Hongkong, Ĉinio.

Individua abono por 12 numeroj: U\$0.40 aŭ 4 respondkuponoj aŭ egalvaoro.
Kolektivaj abonoj por 12 numeroj (2 aŭ pli ol 2 abonoj per sama adreso k
adresito): po U\$0.30 aŭ 3 respondkuponoj aŭ egaloro.

Ĉina Esp-Movado Marsas kun la Rezistmilito

Kiam la japanaj inperiistoj sisteme ekstermas la civilizacion de nia lando detruante persiste niajn kulturajn instituciojn, niaj kulturaj movadoj spitas ĝin k eĉ aktiviĝas pli entuziasme ol antaŭe, kvankam en multe pli mizeraj kondiĉoj. Anstataŭ pompaj lernejoj stariĝas nun konforme al urĝaj bezonoj de la cirkonstancoj mallongdaŭraj kursoj, en kiuj edukiĝas en plej intensa klopodo la gejunuloj pri la scioj necesaj en la sindefendaj k naciŝavaj laboroj. La libero de eldono k organizo ankaŭ multe ekspansias ol antaŭe.

Bona ekzemplo estas ankaŭ nia espa movado.

Anstataŭ la antaŭa "La Mondo", pli malfrue "Esperanto" k la mizeraspekta "Ĉinio Hurlas", aperis post la eksplodo de la milito en Shanghai "Ĉinio Hurlas" en presita grandformato kiel dektaga ĵurnalo. Kiam ĝi ne povis eliri pro falo de Shanghai, ni havas "Al la Nova Etapo"—nun "Justeco"—en Canton, k "Voĉoj el Oriento" en Hankow k "Orienta Kuriero" en Hongkong. Neniam antaŭe en Ĉinio eldoniĝis espaj gazetoj tiel seriozaj k riĉenhavaj.

La neespaj rondoj kun plej granda intereso observas nun la laborojn de espistoj, kiuj donis al ili la informojn el aliaj landoj, kie aktivas la anti-invadisma, porpaca k porĉina movado.


Nun ni eĉ sukcesas disaŭdigi espan radio-dissendon per la Hankow Mallongonda Radio-Stationo sub la aŭspicio de oficiala instanco.

Granda perspektivo etendiĝas antaŭ ni! Sed certe ĉio dependas ankoraŭ de la eĉo de la aliaj landoj al niaj klopodoj.

La 26an de junio fondiĝis en Hankow kun sukceso, la Ĉina Esperanto-Ligo. Ke la nacia grupo tiom longje ekzistinta ĉinaj esperantistoj ĉiuj, ĝuste stariĝas en nuna tempo; plene pruis la nepereblon de la ĉina popolo k renovigan k progresan karakteron de nia rezistbatalo.

La fondiĝa-kunvenon ĉestis pli ol 50 esperantistoj. Alsendis salutajn leterojn k telegramojn al ĝi samideanoj el 5 diversaj urboj. La kongreso aŭdis krom la perespaj laboroj ankaŭ pri la porespaj laboroj en multaj urboj k vilaĝoj precipe en Changsha, Fushih k eĉ Shanghai.

La nove fondiĝita Ligo destinis al la membroj jenajn laborojn: (1) Espo-Servo — perespa agado; (2) Kurso Servo — porespa agado; k (3) Stud-Rondo, altigado de la lingvonivelo ĝenerale. Ĉiuj laboroj kun la celo: en helpo al la rezistmilito k naciŝavo. Tio estas efektiveco de la devizo: Per espo por liberigo de Ĉinio!



Ĉinaj junulinoj ekzercas sin.

PAROLU ESPERANTA POPOLO!!!

ESTIMATAJ GEFRATOJ EL LA TUTA MODNO;

En la malnova lando de ekunuigita k ĉiam pli k pli progresanta Ĉinio nun okazas terura hombuĉado! La kaŭzo estas la senĉesa milita invado de la japanaj militistoj-aventuristoj, kiuj konkerinte Manĉurion ekintrigas por sklavigi la tutan ĉinan popolon k proprigi la tutan landon k riĉaĵojn de Ĉinio! Tio estas ilia fama Kontinenta Politiko, nun, sub la masko de kontraŭ-bolŝevismo. Laŭ Tanaka Pet-skribo ĝi estas la unua paŝo per subigi la tutmondon sub Japana Imperio.

Se ili sukcesus je tiu paŝo, ĉina popolo fariĝus iliaj sklavoj k la aliaj landoj orientaj tuj fariĝus iliaj novaj celaĵoj. K en ilia estonta invadmilito al aliaj landoj, ĉinoj fariĝos iliaj vivantaj municioj, kiaj nun malfeliĉe fariĝas la popolamasoj en Koreio, Formoso, Manĉurio k eĉ tiuj de sia propra lando mem. La intereso, kiujn posedas pacaj eŭropanoj en Ĉinio k Oriento jam nun estas minacataj k detruataj, tiam estos tute nuligitaj. Ĉiuj, kiuj nun facilanime kredas la demagogion de japanaj invadistoj k havas iluzion pri ili, nepre ricevos fulmotondran rekompencan!

Ni ĉinoj jam scias tro multe pri japana imperiismo. Per plej modernaj militaj instrumentoj ili malice ekstermas niajn kulturajn k industriajn k tancojn, masakras nearmitajn loĝantojn precipe la junajn dum ilia rifugado aŭ trafigo en la manoj de tiuj senkoraj buĉistoj. Sed ankoraŭ pli multe perdis sian vivon la virinoj k infanoj, kiuj estas pli malfortaj. En la lokoj okupitaj de japanaj trupoj virinoj ofte estas mortigitaj post esti perfortitaj. Ĉiajn malhumanajn barbaraĵojn ili faras k faradas kun plej terura trankvilo zorgante nenian internacian leĝon, esperante ke ni subiĝos ĉe la teroro k cedos al ili malkaran venkon. Sed ili eraras! Ni jam firme unuigiĝas por batali kontraŭ ili ĝis la fino, ĝis ili forlasos sian invadisman politikon. Kvankam ni, ĉina popolo, tradicie amas pacon k ne emas militi, sed ni neniam akceptos pacon kun sklavecio! Sen ia hezito ni jam ekprenis la armilon, des pli konsciante ke ni batalas ne nur por nia vivekzisto k libero, aparte ankaŭ por la mondpaco k justeco. Sur niaj ŝultroj estas parte portata la estonteco de la homara feliĉo k civilizo. Kun aplomba memfido al la morala energio de nia popolo, kiu jam tiel longe vivas ne minaceble, ni plenumas nian sanktan devon kiel inda filo de la homfamilio.

Nia firmeco tamen ne skuas la kredon, ke nia komunaj malamiko estas la japanaj militistoj k invadistoj, sed ne la japana popolo, kiu suferas nun ĝuste kiel instrumento de la homara malamiko. Iu japana esperantistino prave diris: "La venko de Ĉinio estos aŭroro de tuta Azio". Japana popolo estas niaj samsortanoj!

Ĉikune ni prezentas al vi kelkajn demandojn k petas vin respondi detale k libere laŭ via konscienco, por ke la luktanta ĉina popolo sciu la opinion de la tutmondaj popoloj pri la komuna afero. Nepre respondu k respondigu ankaŭ viajn konatulojn! Viaj respondoj ne restos vanaj, ili fariĝos neelĉerpebla fonto de morala subteno al la luktanta ĉina popolo, atestos al ili samtempe la vivadon de esperanta lingvo k la aktivecon de esperanta popolo.

Lasu nin aŭdi krom la ĉiutagajn bombardojn de furiozaj japanaj aeroplanoj ankaŭ homajn voĉojn por signali al ni ke ni ne estas solecaj!

Atendante vian tujan respondon, antaŭdankas k salutas vin,

Ĉina Esperanto-Ligo

LA ENKETA DEMANDARO

1. Kion vi pensas pri la nuna milito inter la japana imperiismo unuflanke k la rezistanta ĉina popolo aliflanke?
2. Kiu el la interpuŝantaj flankoj fine venkos, laŭ via kredo k kial?
3. Kia rezulto de la milito estos plej dezirinda por la bono de la tutmonda paco k civilizo?
4. Kion vi konsilas al ĉina k japana popoloj k la popoloj de la cetera mondo por fini la militon kun rezulto konfirma al via deziro?
5. Kion vi faris k faras por efektiviĝi vian ideon?

Respondon oni sendu al ĈINA ESPERANTO-LIGO, P. O. Box No. 1732, Hongkong, Ĉinio.

KARAJ LEGANTOJ!

La Redakcio de "Voĉoj el Oriento" atendas sincere viajn kritikojn, konsilojn k sugestojn pri la enhavo de la gazeto! Sendu tuj kelkajn liniojn al la redakcio, P. O. Box 1732, Hongkong, Ĉinio. Antaŭdankon! Krome ni petas atenton pri nia

nova adreso!!!

La Amika Vizito de Ĉinaj Aeroplanoj al Japanio

De la historia vidpunkto la senbomba atako al japanaj urboj de ĉinaj aeroplanoj en la frumateno de majo 20 havas gravan signifon, ĉar ĉio akre pikis la blufon de japanaj militistoj ke de la tempo memorebla okazis nenia fremda intrudo en ilia lando.

En la 13a jarcento Kublai Khan, granda Mongolia konkerinto de Ĉinio, ekspedis kolosan mararmeon el 4400 militŝipoj k 140,000 maristoj por subigi Japanion. Sed abrupta ŝtormo pereigis grandparton de lia eskadro. Kompare al tiu, japanaj kunpuŝigoj kun la okcidentaj potencoj dum la Tokugawa Shogungate reĝimo en la 19a jarcento estas apenaŭ citinda kiel milito.

1895 Japanio venkis Ĉinion k ankraŭfoje gajnis la militon kontraŭ Rusimperio en 1905. En tiuj du kazoj ambaŭ la bataalkampo estis ekster ĝia teritorio. Pro tio la japana popolo preskaŭ neniam suferis pro internacia milito, kaj konservas ĉiam en si la iluzion ke ili estas netuŝeblaj, ĝis la neatendita apero de ĉinaj pezaj bombmaŝinoj super iliaj urboj. Nun ili vekigas spitivele el sia fiktiva imago. Tio signifas ne nur senprecedencan eventon en ĉina historio, sed ankaŭ servis kiel pika averto al japana nacio.

"Dekiam ĉinaj aeroplanoj sukcese atakis Japanion", deklaris en sia ĉefartikolo de Ta Kung Pao, influhava tagĵurnalo en Hankow, "klare pruviĝas la ebleco ke la maŝinoj de aliaj landoj, kiuj posedas plifortan aerforton, facile povas ataki Japanion de la aero."

La fakto ke la ĉinaj aeroplanoj ne uzis la favoregan oportunecon disvastigi morton k detruon inter japana popolo per revenĝi tion, kion la japanaj aviadistoj plenumis en multaj sendefendaj urboj de Ĉinio, nepre impresos profunde la popolojn de la tutmondo. Ĉio kion la ĉinaj atakintoj faris estis nur malgranda nombro da flugfolioj k pamfletoj adresitaj al diversaj tavoloj de japana popolo. Verdire, en mateno de majo 20, kelkaj milionoj da japanoj estis destinitaj je la favorkoreco de ĉinaj bombmaŝinoj.

Laŭ la oficiala anonco, poste identigita de japana registaro, ĉinaj aeroplanoj flugis super la urboj Nagasaki, Fukuoka, Sasebo k iliaj najbaraj regionoj.

La pilotoj raportis ke kiam ili alproksimiĝis al la japana marbordo, serĉlumoj estis direktantaj al ili de la japanaj militŝipoj. Dum la reveno, ili estis atakataj de la anti-aeroplanoj, sed neniu vundiĝis.

Tuj antaŭ la foriro, la 31-jaraĝa eskadra komandanto, Hsu Huan-sheng, kiu iam studis en Germanio k Italio, ekspedis cirkuleran telegramon dirante: "Respektplene ni salutas al Nia Plej Alta Gvidanto Generalissimo Chiang Kai-Shek k aliaj superaj oficiroj por la honoro asignita al ni per partopreni en tiu ĉi ekspedicio. Ni per ĉi tio ĵurpromesas dediĉi nian plej eblan klopodon por plenumi la sanktan mision."

Kelkajn minutojn post unua horo atm. de majo 20, jena sendaĵo estis ricevita en Hankow de la eskadro "Nubo tro alta. Lunlumo nevidebla. Ni estas en blinda flugado."

2an atm. venis alia: "Ĉio bona. Ni flugas super la nubaro."

La tria radiogramo atingis la bazgrundon ĉirkaŭ 2.30 k avizis: "Ni jam estas super japana metropolo. Preta por malŝarĝi niajn pamfletojn k flugfoliojn."

Pli emocia sensacio kreskiĝis kiam la kvara informo, kiu estis ricevita 3an atm. anoncis: "Por pli ol unu horo ni flugis super diversaj partoj de Japanio. Deŝarĝis niajn flugfoliojn. Nenia signo de aerdefendaj agadoj videblaj. Ne anti-aeroplanaj pafoj, nek malamikaj maŝinoj enaerigas."

Iom pli poste venis la sesa: "O. K. Forlasanta japanan marbordon."

La lasta sendaĵo ricevita je 5.17 atm. Ĝi diris: "Tagiĝo. Denove ekvidas nian amatan Patrion."

Bonveniga kunveno estrita de Dr. H. H. Kung, Prezidanto de Ekzekutiva Juan (egala al ĉefministro en eŭropaj registaroj), k Generalo

Ho Ying-chin, Ministro de Milito, estis aranĝita por gratuli la revenon de la aerbatalantoj, kiuj surlandiĝis en Hankow aergrundo je 11.30 de majo 20 en la tondraj aplaŭdoj k milita harmonio de la Aerforta Muzikbando.

"Je la nomo de la Registaro, mi bonvenigas vian sekuran revenon." Parolis Dr. H. H. Kung al la tuta personaro de la ekspedicio. "Mi gratulas ne nur prĉ via braveco, sed ankaŭ pro la honoro de la Aera Forto, kiu estas senprecedenca en ĉina historio."

"Flugfoliojn, instataŭ bombojn, la ĉina aerforto jam montris ekzakte la superecon de ĉina civilizacio k sian akran senton pri humanismo," daŭrigis emfaze Dr. Kung: "Ĉi-foja aeratako pruvas ke ĉinaj aeroplanoj povas facile atingi Japanion k, se ni volas, cindrigi tiujn urbojn lignokonstruitajn. Sed ni ne tion faris, nur pro tio ke la ĉinoj, kontraste al la kruda agmaniero de japanaj aviadistoj al ĉinaj civiluloj, ne volas mortigi ajnan japanan neatalanton."

"Bomboj nur nutras malamon. Flugfolioj instigas la japanon pensi k vekigi kontraŭ la agresivo de siaj militistoj en Ĉinio."

Kiel la reprezentanto de Ĉina Armeo Generalo Ho Ying-chin diris ke la sukcesplena ekspedicio de la Aera Forto pruvis ke la tekniko de ĉinaj pilotoj estas ne malsuperaj ol la japanaj. Li ankaŭ emfazis ke la ĉinaj aerarmeanoj povis facile bombardi la japanajn industriajn zonojn dum la vizito, sed ili ne faris nur pro humanismo. Ĉar "niaj malamikoj estas nur la japanaj militistoj, sed ne la popolo."

Jen estas la ekstraktoj de kelkaj el la pamfletoj, kiuj estis preparitaj de la civilaj organizoj kiel la Ĉina Filio de Mondpaca Kampanjo (World Peace Campaign), la Popola Fremdarilata Asocio, la Ĉina Farmista Federacio k la Japana Anti-Milita Unuiĝo. La aliaj estas leteroj de ĉinaj soldatoj al japanaj soldatoj k tiuj de mutaj japanaj militkaptitoj, en kiuj ili precipe mencias pri la bonkora traktado de ĉinoj post ilia kaptado.

En la pamfletoj de Mondpaca Kampanjo, adresitaj al japanaj soldatoj, oni legas: "Niaj karaj amikoj, pro kio vi plenumas la militon agresivan? Se vi estas batalanta je la nomo de patriotismo, do, kial tiom da viaj patriotoj kontraŭstaras al la milito? Se vi estas batalanta por la paco en Oriento, do, niaj amikoj, vi estas mistifikitaj. Vi neniam akiros pacon per masakro de viaj najbaroj k detruo de iliaj propraĵoj. Se vi estas batalanta por plibonigi viajn vivkondiĉojn, do ni demandu, ĉu viaj vivkondiĉoj plibonigiĝis de post la manĉuria milito en

La Peterco de Ĉina Hompovo

De post la esplodo de ĉin-japana milito lastj Julie, la grandioza tasko ekzerci la popolon pri arto de moderna milito estas akcelataj en viglaj paŝoj. Responde al tio tuj fondiĝis la organizoj nome "La Nacia Armeo-Konskripta Ĉefoficejo" k "La Nacia Amas-Mobiliza Komitato" sub la direkto ke Centra Registaro k rapide disetendiĝis ĝiaj branĉoj en ĉiujn provincojn, urbejojn k ŝien-ojn (distrikto) tra la tuta lando.

La fundamenta ekzercado por kvalifiki ĉinajn civilulojn al milita servo konsistas el tri stadioj. Tiuj kiuj plenumis la unuan stadion estas organizitaj en la Popola Milita Korpuso; dum la dua stadio ili promociiĝas al Normala Milita Korpuso de Justeco k Braveco. K fine en la tria stadio ili ricevas instruon de altgrada milita tekniko k taktiko de moderna milito. De tiam ili fariĝas rezervuloj k estas plene pretaj por aktiva servo.

Hodiaŭ, dek du monatoj post la ekiĝo de la milito, Ĉinio havas milionojn da ekzercitaj rezervuloj plene pretigitaj al la militiro ĉiam ajn.

En la centra provinco Hupeh havanta la tutan loĝantaron de 25,541,636, kiel ekzemple, la rezervuloj en aprilo nombras je 1,700,000. Dum la najbara provinco Hunan kun la loĝantaro de 28,293,735 estis en marto ekzercitaj 2,000,000 freŝaj fortoj. La milita ekzercado ankoraŭ daŭras sub la dispono de Armeo-Konskripta Ĉefoficejo k Amas-Mobiliza Komitato en tiuj du provincoj, samkiel en la ceteraj pro-

CANTON SUB BOMBADO

Kontraste al la amika vizito de ĉinaj aeroplanoj al Japanio, tro brulige okulfrapas la daŭra sendistinga bombado de japanaj invadismaj aviadistoj al Canton dum la pli ol dek sinsekvaj tagoj ekde 28a de majo. Ĉe tiu seninterrompa bombado al plej dense loĝataj kvartaloj de tiu urbejo rezultigis 1627 mortojn k 6760 vundojn k kripligojn por la pacaj loĝantoj. La statistiko pri mortoj estas certe ne kompleta, ĉar la ĉiam denovaj bombadoj malhelpis la fosadon k eĉ kaŭzis novajn mortojn al la savlaborantojn. Cetere la novaj ruinoj ĉiam kovris la malnovajn k la dispecigitaj homkorpoj estis denove dispecigitaj.

Laŭ la duonoficiala statistiko ekde la 1-a septembro lastjare ĝis la 14a junio de la kurenta jaro, la tuta provinco Kwangtung suferis 1430 aeratakojn, la urbo Canton 425. La nombro de la aeroplanoj partoprenintaj la atakojn superis 6000. El la viktimoj de tiuj masakroj la mortoj nombris ĉ. 5000 k la vundoj ĉ. 9000. Pli ol 5300 domoj estis ruinigitaj. Ni tute ne bezonas rimarkigi ke inter la viktimoj estis ĉefe geciviluloj k geknaboj. —Tikos

1931 k la nedeklarita milito en Shanghai en 1932?"

Ĉinaj soldatoj en sia letero al japanaj soldatoj elokventas: "La nuna katastrofo estas ne por via bono nek por la bono de via amata patrio. Via ekstrema sinoferemo servas nur kiel plezuro por viaj militistoj, kiuj fiutiligas vin por siaj ekseptaj egoistaj motivoj. Por emancipi vin mem k vian landon el la jugo de la militistoj, nun estas la plej oportuna momento. Japanaj militistoj estas niaj komunaj malamikoj. La paca strukturo de la Oriento devu esti sur la fundamento de kooperado inter popoloj k soldatoj de Japanio k Ĉinio."

Iu japano militkaptito, nomata Naito Takeshi, skribis al sia patrino jenon:

"Mi estis kaptita de ĉinaj trupoj ĉe Taierh-chwang. Mi havis vundon je la kruro k ricevis bonegan traktadon de la ĉinaj militaj aŭtoritatoj nun."

La Anti-Milita Unuiĝo de japanoj deklaris en sia flugfolio:

"Ni definitive rifuzas servi kiel la ĉashundoj de la militistoj. Nia devo estas puni tiujn militemulojn: Al ili direktu vian pafon!"

—E. TIBU

vincoj de la lando.

Ĉiu viro en la aĝo de 18 ĝis 45 havas laŭleĝe devon al arma konskripto. Tiuokaze, en Szechuen, la vasta okcidenta provinco de Ĉinio, el sep civitanoj unu devas esti armita, laŭ la raporto de S-ro Ko Mo-jo, fama literaturisto Szechuen-ana nun kiel la estro de Propaganda Tin (Tin = subsekcio de la Departemento) de la Politika Departemento de Nacia Milita Komisiono. Baze de tio, li klarigis ke Szechuen kun la loĝantaro de ĉirkaŭ 70,000,000, kiu egalas al la popolnombro de la tuta Japanio, povas rekrutigi 7,000,000 soldatojn.

Por tuta Ĉinio oni asertas pesimiste ke 10 procentoj de ĝia popolo estas disponeblaj por la milita konskripto. La loĝantaro en 16 provincoj de Hupeh, Hunan, Fukien, Kiangsi, Kwangsi, Kwangtung, Kweichow, Szechuen, Yunan, Ninghsia, Shensi, Sikong, Sinkiang, Kansu, Ekstera Mongolio k Tibeto, laŭ la cifero citita en la Ĉina Jarlibro de 1938, nombras entute 227,759,211. El tiuj oni taksis ke 22,775,921 estas kapabluloj k en la milita aĝo.

Je la komenco de februaro ordono de la Centra Registaro estis cirkulita tra la 9 provincoj en kiuj la arma konskripto glitas en plena velo, nome, Hupeh, Hunan, Fukien, Kiangsi, Kwangsi, Kwangtung, Kweichow, Szechuen, k Yunan ke en ĉiu monato de post februaro ĉiu provinco dovas liveri 10,000 virojn al la milita fronto.

Sur la bazo de 10,000 viroj en ĉiu monato, Ĉinio rezervas al si batalan forton de 22,775,921 homoj, kiuj povas daŭrigi la militon por 191 jaroj. —E. T.

MANĈURIO — LA INFERIGINTA PARADIZO

1. "Se vi volas fariĝi riĉulo, iru al Manĉurio!"

La supro estas la popoldiro vaste cirkulita inter terplugistoj en Norda Ĉinio, el tio oni povas imagi kiel fekunda estas la tero en Manĉurio.

Sed ekde la 18a de septembro, 1931, tiam la japanaj rabemuloj komencis militokupi Manĉurion, subite silentis la aplaŭdo k admiro, ĉar la paradizo estas ja transformita en inferon. Antaŭ septembro de 1931, la japanoj pli malpli kaŝis sin en masko, montrante certgradan afablecon al ĉinoj. Ĉar la japanoj ankoraŭ ne pretigis sin por la aktiva invado. Ili sufiĉe bone sciis, se ili ekscitus la ĉinan popolon antaŭtempe povus nur rezultigi fiaskon al sia entrepreno estonta.

Kiam ĉio estis aranĝita k finpretigita, Japanio demetis la maskon k ekagis senbride. Por tion klarigi, nenio estas pli elokventa ol la publika parolado donita de Kobajashi Tettaro, profesoro de Alta Kolegio de Manĉurio, al t. n. "Manĉukŭo"-aj superaj oficistoj, kiujn kunvenigis la Japana Kuantun Armeo (japana armeo garnizonanta en Manĉurio) en julio antaŭlastjara. Malice li diris:

"Pasinta fakto pruvis al ni, ke al vi, ĉinoj, malseveraj traktadoj, moralaj devoj k "Uontaoismo" (japana termino: Ismo kontraŭa al despotismo) tute ne taŭgas. Por viaj samlandanoj nur efikas tiraneco. Do, la programo de nia ŝtatostarigo devas esti bazota sur tri fundamentaj principoj. 1-e, Militeco. Nur per tio ni povas laŭbezone forbalai ĉiujn barojn. 2-e, Ekonomia Unueco. Japanio estas denaske pli talentaj ol ĉinoj, tial ni devas gvidi kiel regantoj ĉinojn por plenumi ĉion tiurilatan. K 3-e, Spirita Unueco. Ĝi signifas la nedisigeblecon de Japanio k "Manĉukŭo"... De nun, mi deklaras solene, ke por la solidareco k bonoj de ni du nacioj, Japanio aplikos rigorajn rimedojn kontraŭ tiuj, kiuj provas spiti niajn principojn! Tiaj rimedoj estas esence necesaj, sed ne timu vi aŭskultantoj, k ankaŭ tion ne rigardu tro grave....."

La japanoj jam publike reklamis sian entreprenon, do, ni vidu, kion ili praktikis. Samtempe, ni devas menci la fakton ke estas absolute malpermesita la elsendo de ajna informo el "Manĉukŭo." La jenaj estas kolektitaj guton post gutu laŭ aŭtentikaj materialoj, kiujn malkovris la rifuĝintoj el Manĉurio. Evidente, Japanio, por eviti la kritikojn de la cetera mondo, volas por eterne teni la realon en vualo.

2. Ekonomia Ekspluatado

Por komplete monopoli la ekonomiajn fontojn de Manĉurio, Japanio adoptis t. n. "Kontrolan Ekonomion". Ĝi aĉetis perforte ĉiujn industriajn establojn de ĉinoj unuflanke, k limigis la disvolvigon de nove starigataj aliflanke. La plej grava industrio kiel aŭto-transporto, estas uzurpata de Japanio k submetata sub la administrado de Fengtien Fervoja Kompanio en Chingchow, k ĉiuj organizoj pri telegrafo, telefono k elektra centro estas transprenitaj de japana Manĉuria Fervoja k Elektra Kompanio.

Japanoj intencas forpuŝi ĉinojn el la ekonomia rondo k plenumi la ekskluzivan monopolon. Tiu-cele, ili entuziasme investas en Manĉurio, de 1932 ĝis 1935, la sumo atingis 22 milionojn da ĉinoj.

En 1935, Japanio publikis la sistemon de "paper-mono", laŭ tio, ĉiuj solidaj monoj estas devigite deponataj en la Ŝtatan Bankon k cirkuleras nur la papermono. La kolektitaj argentaĵoj k kupraj monoj, kune kun la per papermono aĉetitaj plumbo k zinko, estas amase transportataj al Japanlando.

Multaj ĉinoj en Manĉurio, pro la neeltenbla turmentado de japanoj, aspiras fuĝi al siaj propraj hejmlokoj ekster Manĉurio. Je komenco, pro la urga bezono de laboristoj en konstruado de vojoj aŭ militocelaj fortikaĵoj, Japanio malpermesis la ĉinojn elmigri, tamen tio estis forstrekita baldaŭ, kondiĉe ke la elmigranto kunportu nur malpli ol \$50.00 kiel vojaĝelspezon. K la supersumon oni konfiskas. Sed post la publikigo de "papermona" sistemo, pro ĝia senvalideco

ekster Manĉurio, ĉinoj preskaŭ perdis sian tutan ŝparitaĵon k neniel povas reveni hejmen.

Japanoj ankaŭ limigas la monsendon de ĉinoj pere de la bankoj. Se iu volas fari transpagon al interna parto de Ĉinio, unue li devas subskribi ian formulon ĉe la japana oficisto en la banko, k la sumo estas strikte limigita ĝis \$500.00.

Multigigas tag-post-tagela japanaj dungitoj en ĉiuklasaj organizoj oficialaj, antaŭe iliaj pozicioj estis okupitaj de ĉinoj. Ĉinoj, kiuj ankoraŭ posedas sian okupon, restas tre mizeraj pro malegala traktado de japanoj. Ekzemple, la ĉinaj laboristoj en La-pin Fervoja Administracio estis ne salajrataj por ses monatoj en 1936, k en fabrikoj, ĉinaj laboristoj ricevas nur \$0.30 ĝis 0.40 potage, sed oni pagas al samspecaj japanaj aŭ koreaj laboristoj pli ol \$1.00.

En 1935, pere de la pupa registaro de Manĉurio, Japanio proklamis la Akton de Fabrik-marko. Laŭ tio, ĉiuj industrioj inkluzive de la butikoj devas registri sin ĉe la registaro. Sekve, multaj ĉinaj komercaj organizoj ne povis funkcii plu pro la arbitra decido de la registaro, sed kontraŭe, la japanaj k koreaj el tio multe profitis k iliaj butikoj plimultiĝis de 10,545 en 1933 al 14,115 en 1935.

En Shenyang, ĉefurbo de Liaonin Provinco, la negocoj de karbo k presado estas monopoligitaj de japanoj. Ili eksterordinare altigas la vendprezon k gajnas tre multe.

3. Agrikultura Monopolo

Krom la "Kontrola Ekonomia" Japanio ankaŭ aplikas sistemon de "Monopolo de Agrikultura Produkto". Ĝi malpermesas al vilaĝanoj liberan komercadon de ĉefaj produktoj kiel fabo, tritiko k kaŭlĵano (ia nutra greno), kaj devigas ilin liveri nur al la registaro laŭ oficiale fiksitaj prezoj, kiuj estas nature malfavoraj. Post iom da tempo, la japano ilin revendas al la vilaĝanoj per multobligita prezo. Konsekvence, sub tia severa akaparado, la vilaĝanoj fariĝas pli mizeraj k malriĉaj. Ekzemple, en Chingchow, la registaro aĉetis kaŭlĵanon por \$0.80 po pikulo (= 57.6 kilogramoj) post la rikolto en aŭtuno, k ĝin vendis por \$3.00 printempe; k tritikon vendis por \$97.00 po tuno kontraŭ \$40.00 de aĉeta prezo en rikolta sezono.

Plue, por havigi al si la bezonatajn krudajn materialojn, Japanio devigis la vilaĝanojn planti vegetalojn nepreferindajn. En 1936, en la borderaj regionoj inter Kirin k Hailunkiang Provincoj, la japanoj establis grandan ŝafan paŝtejon, aĉetinte 2,000,000 arĵaj-devenajn ŝafojn k 1,100,000 el Mongolio, k altrudis al la vilaĝanoj por ilin bredi. Sekve de tio, vasta kampo fariĝis paŝtejo. La paŝtatoj ankaŭ respondeas laŭkoste pri la perdo de la bredataj ŝafoj.

Sub tiaj senkompataj subpremoj, la agrikulturo en Manĉurio rapide velkiĝis. Laŭ statistiko, en 1932, Manĉurio rikoltis 5,300,000 tunojn da fabo, reduktiĝis ĝis 3,800,000 tunoj en 1936!

La ekonomia monopolo de Japanio en Manĉurio estas ankaŭ konstatebla el la statistiko pri fremda komercado: en 1935-6, 70% de la importitaj varoj estis el Japanio!

4. Armita Enmigrado

Por firmigi la superregadon super la konkerita teritorio, japana registaro ĉiel instigas sian popolon amase enmigri en Manĉurion. La enmigrantoj estas de-kapo-ĝis-piede armitaj. Laŭ la plano, en la daŭro de 20 jaroj, estu 200,000 japanoj translokiĝintaj en Manĉurion. Ili ĉie uzurpis la teron de la lokaj kamparanoj. Ordinare la kotizo de la terpeco kostas \$40 por unu muo (= 1.15 hektaro), sed la japanoj nur pagis \$5.00. En Fuching-hsien, iu kamparano nomata Ŭon, kune kun sia familio el ok personoj, pro malkonsento oferi sian bienon sub tia kondiĉo, estis senkompate buĉitaj de japanaj ĝendarmoj. Krome, la enmigrantoj ankaŭ luprenis kultureblan teron de la kamparanoj perforte. Se ie troviĝas grundo kun bona rikolto, tuj ĝin transprenas japanoj. Kaŭze de tio, okazis ribelo inter vilaĝanoj en Chian-

hsien, tamen ĝi estis sufokita de japanaj trupoj post tuttaga batalo kun la rezultato de 76 junaj ĉinaj kamparanoj mortpafitaj. Pro la sama kaŭzo, en 1934, dum la sufiĉe famkonata ribelo de kamparanoj en Ilan, pli ol 2,000 ĉinoj fordonis sian vivon.

Japanoj ankaŭ forrabis de ĉinoj fekundajn kulturejojn tute senpage. Nur en la norda parto de Kirin Provinco k la regiono laŭlonga de la La-Pin Fervojo, Japanio planas alproprigi al si 160,000,000 muojn da tero nun kulturata de ĉinoj, k en Mosa distrikto ĉirkaŭ 10,000,000 muoj estas k estos konfiskitaj.

La rimedoj de japanoj por rabi la vilaĝanojn estas neimageble kruelaj. Ekzemple, en Hailunkiang Provinco sin trovis iu granda bienulo, kiun la japanoj intencis rabi, sed hezitis por nescio pri lia posedaĵo. Do, la rabistoj inventis metodon per la sendo de pli ol 10 japanoj ĉe la bienulon por lin helpi k samtempe lerni ion de li. Kiam ĉio de li estas elspionita, tiam la japanoj lin tuj arestis sub arbitra preteksto, k konfiskis lian tutan havaĵon.

5. Impostoj k Depagoj

Kiam la japanoj komencis superregi Manĉurion, antaŭ ĉio ili abolis kelkajn bagatelajn impostojn. La popolo ja estis mistifikata portempe. Sed baldaŭ alvenis la novaj, multoble pezaj ol la antaŭaj. Nun, eĉ por hundo oni devas pagi \$0.30 k por po kvino da kokoj, anasoj aŭ anseroj pagas \$0.70 ĉiujare kiel imposton. Al bruta-buĉado, la japanoj impostas altan deĵagon: por unu porko \$4.20, ŝafo \$2.50 k bovo \$6.00. Krom tio, japanoj eĉ impostas la homon. Ili vendas ian "Atestilon por bona civitano" certigantan ke la tenanto ne estas bandito kontraŭ la pago de \$0.10 k ĝi validas nur por unu jaro. Krom la supre cititaj ekzistas interalia la Impostoj de Terpeco, Polico k Eduko, Volontula Korpuso, Loĝado, Kamenio, Funebra Ceremonio, Edziĝfesto, Teatra Prezento, Landvojo, Bonfaro, Malriĉul-Savo, Bandit-Eliminado, Domnumero..... ktp.

Laŭ la statistiko de japanoj mem, en 1936 la Impostoj de Terpeco sumiĝis je kvarono plimulto ol antaŭe, de Brutaro je sepono k de Loĝado je kvaroblo. Por la enmigrantoj, vojkonstruado k "bandita" eliminado Japanio bezonas monon tre urĝe, tial ĝi devas adopti multspecajn krudajn impostojn en Manĉurio. De 1933 ĝis 1936, Japanio elspezis 3,000,000,000 da ĉinoj en Manĉurio, tiu sumo nepre estu tributataj de tieaj ĉinoj!

En la urbo ordinare ekzistas tri impostoj: 1. Komerca Imposto, tio sumiĝas kvinoble de antaŭe; 2. 10% Depago de la Profito k 3. Imposto laŭ Takso (?). Por tiun lastan komprenigi, mi nepre devas malŝpari kelkajn pliajn liniojn. Tiu imposto estas bazata sur la "takso" pri la valoro de la butiko impostota, unue, oni ekspedas japanan ĝendarmon al la butiko kiel taksanton, k poste li faras raporton al la oficiulo. Laŭ tiu oni arbitre fiksis la sumon impostotan k ordonas la impostoton pagi en certa templimo. Laŭ la informo el Shenyang, la proporcio de la pago estas sufiĉe granda, por la butiko havanta kapitalon de \$2,000, oni devas pagi \$100 kiel tiun kuriozan imposton.

Ankaŭ citindaj ĉi-tie estas diversaj kontingentaj pagataj de la komercistoj ĉinaj. En 1936, kiel ekzemplo, la japanoj proponis la kolekton de "Mono por Kondolenci la Armeon en Suiyuan Milito"; 1935, en Japanio okazis tertremo, oni ankaŭ postulis kontingenton da mono. La sumo estis kolektata tute "laŭvole" k pli ol 10 fojoj ĉiujare.

Ĉar la komercistoj preskaŭ neeble eltenas la pezan ŝargon de tributoj, kelkaj elpensis rimedojn por trompi la oficiulon. Kaŭze de tio, japanoj adoptis novan aranĝon ekde septembro de 1936, ordonante ĉiujn komercistojn registri konton en du kopioj. Laŭ tio, oni devas sendi la duplikaton de la enskribo al loka registaro po dutage por la kontrolo. Tre ofte okazas severa demandasploro pri la ĝusteco de la dokumentoj.

6. Narkotika Politiko

Plenuminte la okupadon de Manĉurio Japanio tuj proklamis la leĝon de publika vendado de opio k aliaj narkotikoj, k starigis grandan

MODERNAJ DAVID COPPERFIELDS EN ĈINIO

nombro da opio-fumejoj en ĉiuj urboj, pretendante ke tio estis por liberigi la popolon. La nuna Manĉurio fariĝas efektive la paradizo, de opio-fumantoj, ĉe ĉe la plej angula vilaĝeto, ankaŭ troviĝas unu aŭ du tiaj venenaj disvas-tigejoj.

Japanio plue devigas la vilaĝanojn okupi sin en la plantado de papavo (el tiu oni ekstrakas la opion). Oni fiksas leĝe la proporciojn de la terpeco por la papavplanto je 5%, k por ĉiu mo impostas \$15.00.

Krom opio, ankaŭ vaste distribuiĝas en Manĉurio aliaj narkotikoj kiel morfino, heroeno k aliaj venenaj drogoj

Por amuzi siajn klientojn, japanoj dungas multajn knabinojn en la narkotikaj fumejoj. Nur en Harbin, en 80 ejoj estas dungitaj 2,400 tiaj duon-publikulinoj.

Japanoj ankaŭ entuziasmas pri la entrepreno de bordeloj, el Japanio k Koreio, multaj publikulinoj terne difektitaj de sifiliso estas enportitaj en Manĉurio. Sed ili ankoraŭ ne sufiĉas pro la tre rapida disvolvigo de la finnegoco. Sekve, la japanoj rekrutigas perforte en la vilaĝoj junajn ĉininojn por sia dispono. En iu vilaĝeto nomata Kao-cha-tun, oriente de Fushun-hsien, estas garnizona grupo el 50 japanaj soldatoj, al la vilaĝestro ili aroĝis 20 knabinojn por voluptemo, alie lian belan filineton oni perfortos. La vilaĝestro ne povis kontraŭstari al tio, por ke la soldatoj kontentiĝu, li aĉetis laŭpostulite la junulinojn kontraŭ la pago de \$300 por ĉiu homino. Postkiam la knabinoj estis atencitaj, la japanaj soldatoj ekstarigis bordelon en la vilaĝeto k prostituis ilin por elbaki monon.

Ankaŭ multajn vetludejojn grandskalajn establis japanoj. Pro tio bankrotis multaj ĉinoj.

Konklude de la suproj, en Manĉurio abundas nun profesiaj vetludantoj k narkotikaj difektitoj. "Lauleĝe" ili estas obeemaj civitanoj, sed, por normalaj loĝantoj, ili fariĝas danĝeraj apaĉoj.

7. Sklaviga Edukado

Ĉiaj lernolibroj en Manĉurio estas jam plene reviziitaj. Pri la historio oni rakontas nur de la Liao k Kin dinastioj (tio estas de la deka jarcento), antaŭ tiu epoko oni nenion mencias por ke la ĉinoj forgesu sian devenon. En liceoj, en la unua klaso oni enkondukas ĉinan historion, sed en la dua klaso restas nur japana historio, k citas ekskluzive japanajn heroojn en pasinta historio kiel la edukatoj. Oni difinas japanan lingvon kiel la unuan fremdlingvon en ĉiuj lernejoj, k po semajno lernigas por 6-7 horoj. En la lernolibroj troviĝas tro ofte la frazoj kiel "Japanio-Manĉukŭo-a Amikeco", "Pan-Azioismo", "Dankemon al la helpo de Japanio" ktp.

En ĉiuj edukaj organizoj, Japanio instalas sian spionon kiel la viculon, pli multaj estas komisiitaj kiel instruistoj. La japana viculo havas superan aŭtoritaton por mastrumi ĉion, kion ofte la ĉina estro ankoraŭ ne estas informitaj.

Al ĉinaj dungitoj en lernejoj, ĉiam estas esplordemando, traserĉo, de dormĉambroj fare de japanaj ĝendarmoj; k arestoj, malaperoj de ĉinoj ankaŭ okazas ne malofte.

La lernolibroj estas monopole vendataj de la japanaj oficistoj, kiuj ofte prokrastas ĝian aperigon. Kelkiam ĉe ĉe la fino de lernotempo, la lernolibroj ankoraŭ ne estas pretaj. La prelegaĵo preparita de la instruisto devas unue esti sendata al la Speciala Servo de Eduka Ministerio en Changehun (la ĉefurbo de "Manĉukŭo") por strikta cenzuro, k ĝin oni rajtas uzi nur post permeso.

Multaj altaj lernejoj k universitatoj en Manĉurio nun estas fermitaj, ĉar japanoj opinias ke tiuj estas superfluaĵoj k por ĉinoj sufiĉas nur la metiista eduko. Bazite sur tiu konsidero, la lernantoj de Manĉurio ofte estas devigataj al stratoj, kun balailo en mano, por purigi la pavimon k defluilojn aŭ servas je kuirado k purigado en lernejoj.

En ĝusta senco, la edukado de Manĉurio nur estas la rimedo por dresi ĉinojn en obeemajn servutulojn k nenio pli.

8. Persekuto al Intelektuloj

Milmitoj da senkulpaĵaj ĉinaj viroj, virinoj k knaboj fariĝas sensirmaj k senhavaj dank' al la kruda invado de japanaj militistoj. Malkovriĝas multaj kortuŝaj historioj de la militaj rifuĝintoj. Inter tiuj estas rakonto pri du modernaj David Copperfields, kiuj aĝas je naŭ k sep respektive. Ilia plorinda vojaĝo al la ariergardo finiĝis feliĉe dank, al du harmonikoj, kiuj estas la solaj elsavitaĵoj de ilia detruita hejmo.

Ekspedicio el ĉirkaŭ 5000 civiluloj, ĉefe maljunuloj, virinoj k knaboj, vojaĝis kune lastvintre sur piedoj en la multe rondira vojo al Hankow por fuĝi de la milito kiu furiozis tiam en la orienta fronto. Ili forlasis siajn hejmojn je la plej kriza momento. Inter ili troviĝis du knaboj nomataj Hsu, ankaŭ de la "Malsupra Rivero" (malsupra Yangtze). Akompanis ilin patrino, kiu intencis renkonti la patron, ano de La Banko de Ĉinio, en Chungking, ĉeborda urbo de supra Yangtze en Szechuen Provinco.

Dum la migrado krom pluvojn k neĝojn la grupo suferis nerakontebajn malfacilojn. Tamen la knaboj, spite al sia junaĝo, staris firme k eltenis ĉion. Ili portas pene per siaj malfortaj ŝultroj, krom simpla pako en kiu plenas kelkaj aĵoj nur du harmonikojn, la plej ŝatataj novjaraj donacoj de la patro al la filoj.

La buŝaj orgenoj estis tre utilaj dum la vojaĝo, ĉar per tiuj la knaboj ne nur amuzis sin mem, sed ankaŭ irspiris plezuron k kuraĝon al la rifuĝantoj. Tamen ili neniam imagis ke la harmonikoj eventuale fariĝos la unikaj instrumentoj por kontaktiĝi kun sia patro mil mejlojn for!

Post tagoj de amara vojaĝo per vezikiĝintaj piedoj k ofte kun duonplenigitaj stomakoj, la rifuĝanta trupo estis ekvidita de eskadro da malmikaj aeroplanoj. Ili ekflugis malsupren al sia delikataj ĉasataĵoj k superŝutis ilin per pluvoj da kugloj, dispelinte la terorigita popolo al ĉiuj direktoj.

Inter la pafmortigitoj estis la patrino de la harmonikaj ludantoj. Ili suferis la perdon brave. Kompatemaj kunuloj prenis ilin. La knaboj, entombiginte sian malĝojon profunden en la koro, daŭrigis la vojaĝon kun aliaj.

La intelektuloj en Manĉurio estas sub al fera jugo de Japanio, ili eĉ ĝemas malfacile. Por ili ĉie embuskas danĝero, esplordemando, traserĉo de loĝejo, aresto, malaperigo, enkarcerigo, pafmortigo. Kompare al tiuj, kiuj, iam travivis sub rusa carismo ili estas pli mizeraj k sendefendaj.

Por tion klarigi, mi citas kelkajn elstarajn okazintaĵojn jene:

(1) Je 2a de majo, 1936, la pupa imperiestro Puji de "Manĉukŭo", reveninte de la vizito al Japanio, publikis "Dekreton Revenan", en kiu ŝaŭmis flataj diroj kiel "Amikiĝu Japanio k Manĉukŭo", "Internacia akordiĝo"..... ktp, k altrude rekomendis ĝin al la tutaj lernantoj por legi parkere. Plue li fiksas tiun tagon kiel memortagon, dume ĉiuj lernejoj devas aranĝi memorfeston. En la agendo de la ceremonio inter aliaj troviĝas unu programo, laŭ tiu ĉiuj devas genufleksi direkte al la palaco, en kiu loĝas la "Imperiestro" el-bakita de la japanaj rabistoj, narkotikistoj k bordelo-posedantoj. Estas en Chuhsien iu lernejo fondita de kristanoj nomata "Vei Ven Lernejo". La lernantoj kristanaj, pro siaj tradicioj, ne volis plenumi tian feŭdisman servon. Eksciinte pri tio, la japana konsilanto en la loka registaro furioziĝis k ordonis la tujan fermigon de la lernejo, k ke ĉiuj en ĝi estu arestitaj.

(2) 25an de sammonato, la Kvara Nacia Armeeo, gvidata de Chao Kuo-Si, malsukcese atakis la japanajn garnizonojn en Fanchen-hsien. Post la atakantoj estis forpelitaj, la japanoj traserĉis la tutan urbon. Kiam ili atingis Kiu-Ko-Lu, ripozante en iu lernejo, ekvidis sur la muro de la klasĉambro jenajn skribojn:

"La junuloj devas vivi kiel fluanta akvo,

Transsaltu ĉiajn malhelpaĵojn antaŭ la vojo."

"La junuloj devas vivi kiel vagi en nokto,

Tenu glavon en la maldekstra mano k lampon

Kiam la grupo trafis Hankow, la knaboj estis transprenitaj de la loka milithelpa organizo k entendigitaj kun miloj da aliaj geknaboj, kiuj ankaŭ estis senhejmigitaj k orfigitaj, provizore aŭ poreterne, de la invadistoj.

Iutage, tiu milit-helpa organizo organizis multajn propagandajn grupetojn por patriotisma agitado. Ĉar la knaboj estas tre kompetentaj je la harmonikoj, ili estis varbitaj en unu el la grupetoj. Oni asignis al ili rolon ĉe unu el la plej homplenaj stratoj de Hankow, la kruciĝinta Kiang Han Road, kie, dank' al la diino de ŝanco, staras la domo de La Banko de Ĉinio. Ludante la harmonikojn emocie la grupeto allogis tuj ĉirkaŭ si amason da homoj, inter ili estis kelkaj bankanoj ĝuantaj sian postmanĝan intertempon.

Pro simpatia intereso pri la etuloj, la apudstarantoj komencis pafi al ili demandojn. Kvankam ne tre preciza sed certa ke ilia patro estas ano de la sama banko, tiuj modernaj David Copperfields petegis kun infana insisto ke la bankanoj helpeme komuniku ilin al la patro. Poste la peto atentigis la estron de la banko, kiu faris kelkajn demandojn k konsentis telegrafi al la branĉa oficejo en Chungking pri la afero.

Respondo estis tre baldaŭ akirita en kiu la patro speciale konfirmis pri la identeco de la harmonikoj. Nun la knaboj, dank' al ilia kuraĝeco k precipe al la harmonikoj, estas sekuraj k feliĉaj kunvivi kun la patro kvankam ili patrinon ne plu havas. (E. T.)

JURNALISTOJ ATENTU!

Mi volas korespondi kun tutmondaĵaj ĵurnalistoj interesanĝante informojn ĉefe pri politikaj eventoj, kulturaj movadoj k popola vivo. Respondo garantiata.

E. TIBU:

P. O. Box No. 74, Hankow, China

en dekstro."

Soldatoj demandis, "Tre leginde. Kiu ĝin verkis?"

Neglektante la embuskitan malicon en la demando, la lernejestro sciigis la nomon de la verkinto, Fu-cho-chou, kiu ekmalaperis post kelkaj tagoj, k oni deklaris la fermigon de la lernejo samtempe.

(3) Antaŭ nelonge, en Tsitsihar la japanaj ĝendarmoj arestis 23 ĉinajn instruistojn, studentojn k oficistojn samtage sen ia klarigo. Kvin el ili estis pafmortigitaj, aliaj kondamnitaj je 6-15 jara malliberigo.

(4) En somero de 1936, iu kapitano de japana garnizona trupo hazarde vizitis la vilaĝan lernejon de Si-Mo-chen, en ĉambro de iu instruisto trovis du novelojn "Aspiro" k "Seniluziĝo", verkitajn de fama ĉinan verkisto Mao Ten. Tuj la kapitano denuncis la instruiston al la policejo k neniu plue informiĝis pri lia sorto.

(5) S-ro Wong, fakestro de Ching-hsien gubernia registaro, ricevis eteron lastprintempe ekspeditan de sia amiko el Peiping, en kiu simple estas demando pro kio lia filo ankoraŭ ne alvenas al Peiping. La letero fatale trafis en manon de la japana cenzuristo, kiu denuncis lin kiel kunko nspiranton en la organizo de la antijapanaj elementoj en Peiping. Oni lin arestis k pafmortigis post mallonga proceso.

La ekzemploj estas tro multaj, por ĉion enskribi necesas dikega volumo. Eble ĉi-tie ankoraŭfoje citinda estas la japana statistiko, kiu montras ke la nombro de lernejo nun reduktiĝis 14,000 kompare al 21,000 antaŭ 1931!

(Esp-igis E. Tibu)

Diskonigu k Abonigu
"Voĉoj el Oriento"-n

“En Kelkaj Mallongaj Horoj De La Mateño”

(Rakonto de usona misiistino en milita zono)

Iu usona misiistino en la milita zono de Anhwei Provinco, volontule servis kiel nokta flegistino en iu hospitalo. La urbon jam okupis japanoj en lasta februaro. Ŝi, krom propra devo, ankaŭ servis por protekti ĉinajn virinojn k knabojn, kiuj rifuĝis en la misiista korto. Tamen, ŝi ankaŭ ŝparis tempon por skribi taglibron.

La aŭtorino ne volas publiki sian nomon nek tiun de la urbo, ĉar ŝi kune kun kelkaj aliaj ankoraŭ restas tie dank' al la “bonkoro” de japanaj trupoj. Pro pli malpli konceptebla motivo, ŝi preferis nomi japanojn “suno”, “sunradio” k “sunbrilo” en la verko.

Sube estas ŝiaj skribaĵoj, kiuj atingis Hankow rondire. Ĝi datiĝas de 30 januaro ĝis 10 februaro, vere eventriĉaj tagoj en la urbo. La rakontoj kvankam estas malĝojigaj, sed legindaj.

Dimanĉo, Januaro 30. Hodiaŭ estas jarfino laŭ ĉina lunkalendaro. Ĉiuj havas gajajn humorojn k multajn festenojn. Laŭ ĉina kutimo, niaj tri dolĉaj maljunaj servistoj donis al ni grandan festenon. Tio igis min preskaŭ plori—ili ĉiuj gajnas la maksimuman salajron de \$10.00 po monato, k per tio subtenas siajn tutajn familiojn. Manĝaĵo estas malkara antaŭ la novjaro, tial ni antaŭpagis al ili duonmonatan salajron k donacis \$1.00 kiel gratifon (pakita en ruĝa papero—ĝi estas la korekta formo por donaco en Ĉinio) por ke ili havu manĝaĵojn en provizejo. Sed ili elspezis tion por nia orgio! Ili aranĝis ĉion kun plezuro tiel ke ni devas ĝui ĝin kiel rekompenco.

Lundo, Januaro 31. Ĉina novjaro. Ĉiuj estas feliĉaj. Tamen la celebroy en tiu ĉi jaro estas multe malgrandigitaj. La sunbrilo kiu inundas tiun ĉi landon jam penetris preskaŭ ĝis nia najbara urbo. Pri tio ni ĉiuj bone scias.

Mardo, Februaro 1. Ni aŭdis ke la suno jam atingis preskaŭ al nia najbara urbo. Pro tio la resto de la hospitala dungitaro rezignis sian postenon—tri viroj (du estas kuracistoj) k unu knabino. Ili preskaŭ persvadis la alian etan knabinan flegistinon forlasi kune, sed tion haltigis Bob. La ĉeflegisto vakas, sed ni sukcesis lin teni al la ofico. Tial restas nur li k unu flegistino por zorgi pri aro da gravaj pacientoj, k mi mem decidis preni la taskon de nokta servo.

Merkredo, Februaro 2. La nokta servo kaŭzas al mi nerezisteblan tediĝon k dormemon. Rampinte en la liton por dormi, tuj mi aŭdis la muĝadon de aeroplanoj. Sed mi ne estis ĝenata nek ellitiĝis. Ĉirkaŭ 11:00 antaŭtagmeze, mi aŭdis la bruegojn kiujn mi neniam spertis antaŭe—multaj eksplodoj. Nia domo ankoraŭ ne estis skuata nek klakigata. Ni estis bombardata! Kvankam ne tre konsciis pri tio, sed mi elrampis el la lito kiel ordinaro. Ĉasite kuris al mi la ĉina servisto k diris en ĉina lingvo: “Fraŭlino, alvenis jam la aeroplanoj. Iru al la anti-bomba tranĉeo. Rapide, rapide!” Mi ne estis tiel ekscitata kiel li, tamen mi ĉesis surporti la pelton sur mia banrobo k nokta vesto. En la tranĉeo jam troviĝis la doktoro, la flegisto, la ĉina servisto, k la aĝorinda ĉina knabino, kiun adoptis kelkaj usonaj misiistoj, apud la maljuna servisto. Poste mi trovis bomb-splitaĵojn en la ĝardeno de la virina hospitalo. Feliĉe, la eksplodo okazis ĝuste post la forlaso de nia dungitaro en ĝi. Kiam la aeroplanoj foriĝis, mi denove sin vestis k vizitis la hospitalon. Ĉiuj estis konsternitaj, sed senvundaj. Ŝajne la japanoj uzis malpli grandajn bombojn en tiu ĉi atako, ĉar ni ne aŭdis la terurajn klakojn kiujn ni havis antaŭe, kiam nia najbara urbo estis bombardata.

Pli poste vunditoj komencis enflui en nian hospitalon. Dio, kion mi vidis! La doktoro k mi k ĉiuj aliaj kuracistoj k geflegistoj de la virina hospitalo streĉe okupis sin por kelkaj horoj. Kompare al tio, kion aliaj lokoj spertis, nia malgranda bombardado estas nur kiel guto en la sitelo, sed por mi tio jam sufiĉas! Ni absolute havas nenion celindan por japanaj aeroplanoj. Antaŭe ĉi tie estis miloj da soldatoj, sed ili jam evakuis la urbon antaŭ kelkaj semajnoj. Nun restas nur kelkaj, kiuj de pactemo gardas la urbon. Kun la ekcepto de unu aŭ du, la loĝantoj bombarditaj—k terure kripligitaj—estas senkulpaĵaj, pacamaĵaj, pri siaj

negocoj zorgantaj civilanoj. Posttagmeze amasoj da popolanoj ekfuĝis de la urbo. Pri tio mi eĉ ne povas priskribi—vera tragedio! Ĉie estas elĉerpitaj civilanoj vagi kun siaj mizeraj havaĵoj sur la ŝultroj k celas nenien—nur “foriri”. K aliaj grandiozaj homamasoj trovis sekurejon en hospitala korto k komencis enporti sakojn k valizojn. Ili pensis ke ĉi tie estas sufiĉe sendanĝera por iliaj posedaĵoj. Ankoraŭ multaj kuregis al ni ĝiskiam ni ilin haltigis.

Ĵaŭdo, Februaro 3. Lastan nokton ni akiris informon ke la suno jam leviĝis super nia najbara urbo. Ni ne scias ĉu japanoj aŭ ĉinoj bruligis tiun urbon en la nokto. Hodiaŭ, ĉirkaŭ tagmezo, la unuaj etaj radioj de sunbrilo tamen lumis super ni—kvankam estas malvarma, malhela tago—k pli poste alvenis plimultaj. Absolute forestas batalo—ili nur promenis al ni k la urbon ekposedas. Tri el ni decidis iri en la straton por “vidi kion ni povas vidi”. Ni renkontis kelkajn el la novalvenintoj, kiuj rigardis al ni (k ni al ili!) sed ne nin ĝenis. Ili vizitis de pordo al pordo k traserĉis la domojn kiuj estas malfermitaj. Ili nepre faris pretendojn pri la traserĉo, kiel vi scias! La stratoj estis plenigitaj de homoj kun belaj, varmaj litkovriloj rapidantaj al la loĝejoj de la novalvenintoj. Iom poste, anstataŭ litkovriloj, ni vidis kokidojn, dikajn kokidojn, kiujn probable bredis la civilanoj por la festenoj en la novjaraj festtagoj. Sed sunradio devas manĝi, kiel ni scias. Ili eniris la urbon por malpli ol unu horo kiam ni aŭdis ke iu estis mortpafita nur pro la kulpo ke li iomete prokrastis alporti sian litaĵon k manĝaĵon al la novaj alvenintoj.

Ili eniris ankaŭ en nian hospitalan korton. La doktoro estis tuj alvokata. Ni ne scias per kia lingvo li konvinkis la vizitantojn ne eniri la domon. Ili vere estis tre ĝentilaj al nia doktoro. Mi estas certa nun ke nin fremduloj oni ne turmentos. Nun mia espero nur estas en tio ke ni povas sukcese savi niajn ĉinajn dungitojn k amikojn el la pafmortigo. En nia korto estas nombro da fortikaj k belaspektaj edukitaj junuloj, k mi ektremas kiam mi pensas kion okazos al ili.

En la korto de la lernejo (fermiĝis antaŭ du monatoj) ankaŭ loĝas centoj da rifuĝintoj. Ili kunpremiĝas simile al sardeloj, kune kun siaj litaĵoj k diversaj malordigitaj manĝaĵoj. Ĉie staras malgrandaj fornoj. Mi tre zorgas pri la afero de provizaĵoj.—Ĉu la vilaĝanoj ankoraŭ povas enporti la vegetaĵojn k kokidojn ktp. en la urbon?

Pliposte, mi banis k preparis min al la deĵoro. Certe mi ĝojas ke mi restas ĉi tie—almenaŭ, al la centoj da popolanoj, ni ŝajnas esti komfortaj. Vidinte kelkajn el la sunradioj posttagmeze, ni ekhavis la ideon: kia kortuŝe malegala milito estas inter la du landoj. La sunradioj vestas k ekipas sin sufiĉe bone. Ili aspektas harditaj k ŝtoniĝintaj. Sed la indiĝenaj trupoj kiujn ni renkontis, kontraŭe, estas mizere ekipitaj k mienas tiel mildaj, pacemaj, knab-aspektaj. Komprenoble, ni ankoraŭ ne vidis la Centrajn Armeojn, kiuj estas plibone ekipitaj. Do, bonan nokton!

Februaro 8. (En kelkaj mallongaj horoj de la mateño, ĉar mi restas esti la nokta flegistino).

Mi divenas ke ni estas nun en la milito, kvankam ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne okazis batalo ĉi tie. Malgraŭ la radio raportis nokte ke

la japanoj puŝis sin al nia urbo, fakte ili nun jam starigas sian ĉefstabejon ĉi tie. Ni ĉiuj bone scias ke ili estas kun ni jam por kelkaj tagoj, sed mi ankoraŭ ne alproksimiĝis al ili kiel aliaj faris. Ĉiu el ni, ekcepte de mi trovis specialan lokon por gardi k provi sinprotekti. Unu el ni vizitis la knaban lernejon, kie troviĝas ĉirkaŭ 1500 rifuĝintoj, k ekhavis la plej interesajn travivaĵojn. En la oficejo ŝi posedas kelkajn teajn servicojn k gastigis per tio variajn grupojn da sunradioj, kiuj ŝin vizitis. Okaze iu konis unu aŭ du vortojn el angla lingvo, k ĝenerale ili povas skribi ĉine, sed nur unu aŭ du povas paroli ĉinlingvon. Pro tio ili ĉiam tenas en manoj kajerojn k konversacias skribe. Kelkaj el la soldatoj malkonsentis “teni” sin en la oficejo k ekvelis ekzameni ĉirkaŭe. Tio kaŭzis grandan eksciton inter la rifuĝintoj. Kiom mi scias, laŭ mia scio, ili ne forportis ajnan manĝaĵon aŭ litaĵon de la rifuĝula tendaro, sed unu preskaŭ fortrenis iun belan knabinon. Ĉar la misiista instruisto rapidis al la sceno en ĝusta tempo por diri “ne”, tre emfaze, k ripetis tiun neon por ĉirkaŭ 15 minutoj ĝis la soldato finfine forlasis nin sen la knabino. Sed plejmulte de la urbanoj ne estas tiel bonŝancaj, post la unua tago kiam la sunradioj aivenis, pliaj centoj da popolanoj fuĝis en nia korto por protekto. Iu familio atingis nian domon k aranĝis por restadi, k nur iom poste, unu el la fratoj rapidis al ĝi k diris “la soldatoj jam kaptis nian fratinton”. Unu el ni rapidis kun la knabo k trovis la knabinon en la kabano gardatan de unu soldato ĉe la pordo por malebligi al ŝi la eskapon. Kiam ŝi ekmoviĝis, la soldato tuj kaptis ŝian brakon k diris: “iru kun mi”. Tiamaniere oni ŝin forkondukis.

Je la unua nokto de la alveno de novalvenintoj ĉiuj havis inkubon—sed mi dormis profunde. Aretoj da ili seninterrompe vizitis nin tutan tagon k postulis esplori nian ejon. Devigate ni ilin akompanis k pretendis ke ni estis plene timigitaj. Ili ne ĉiam estas ĝentilaj. Iu forprenis litkovrilon, poŝlumilon, manĝaĵon k monon de unu el la misiistinoj. Alia pelis ŝin kuri ĉirkaŭ la anti-bomba tranĉeo per la aperturo de sia granda, longa pafitubo ĝis ŝia dorso. Iufoje alvenis du doktoroj k la tuta hospitalo estis tre ekscitita kiam ili enportis tri siajn vunditojn. Ni klopodis por tuta tago je unu el la brutoj—por ke li povu eliri tuj k mortigi plimultajn ĉinojn. Tamen li mortis. La sunradioj ofte neis ke ili perdis ajnan homon, sed ni scias certe ke almenaŭ unu estis mortigita ĉi tie.

La alvenintoj diris al ni ke ili ne batalas kontraŭ la ĉina popolo, sed nur la komunismo. Kompatindaj malsaĝuloj—ili estas tro informitaj pri tio de sia registaro k kredis tion!

Ankaŭ ili diris ke ili volas helpi k protekti ĉinan poplon, sed ĉi tie ĉiuj butikoj estas entruditaj k detruitaj! Hodiaŭ iu malgranda 14-jaraĝa knabo foriris de nia rifuĝula tendaro por viziti sian fraton en hejmo. Survoje li renkontis soldaton k ricevis gravan pikvundon. La urbo estas plenkuna kun tiaj okazoj, k ni scias tro multe. Diroj estas malkaraj, tial ili malŝparas kelkajn belsonajn vortojn. Sed la unua eraro estas tion kredi.

La japanoj plenumis ĉion per sia tuta povo por malklerigi ĉinojn en regionoj kiujn ili okupas. Ili restarigas malnovajn formojn de edukado, elradikigas ĉion kion ebligas al ĉinoj progreson. Ili revivigas la malnovajn formojn de religio trudante al ĉinoj antikvan adoradon. Ili stimulas la opian negoon. Aŭ, alivorte, ili abrupte subpremas ĉion ajn, kio rezultigos disvolvon aŭ progreson al Ĉinio.

Februaro 10. Bone, ŝajnas al mi ke kiam mi surŝipiĝis sur la malgranda “Roseville” k veturis al tiu ĉi lando, mi jam ŝovis min en la militon! Ĉi tie, mi ne povas diri ke ni usonanoj ion suferis, se ne enkalkulas la malfacilan endormiĝon. Ni havas sufiĉan manĝaĵon k pli malpli bonajn kontaktojn kun la sunradioj, k ni ankaŭ scias ke ni mem estas sendanĝeraj.

ĈINAJ BUDAISTAJ MONAĤOJ SERVAS SUR LA BATALEJO

Dekiam la unua Budaisto instalas sin sur ĉina tero, ĝisnun dum 1872 jaroj la monaĥoj dediĉis nenion kiam la lando suferis militojn krom preĝi al dio por ke la plago ĉesigu rapide. La minacon de subita morto sub glavo ili komprenis. Kaj pli terura estas amasa morto kiun kaŭzis japanaj aeroplanoj lastaŭguste. Tio pelis la plejparton de ĉinaj religianoj el de iliaj monaĥejoj al la batalkampo por la unua fojo en la historio.

Unue ili servis kiel homportistoj ĉirkaŭ Shanghai. Nun ili marŝas kun la tempoj. La monaĥoj fariĝas jam mekanikizitaj. En la lasta majo grupo da Budaistoj forlasis Hankow al la Shantung fronto kun du motor-ambulanceoj, dudek homportiloj k kompletaj da medicina provizo. Dume iliaj samreligianoj en Hankow planas gigantajn religian ceremonion por honorigi la mortintojn k kolekti monon por pli multaj ambulanoj.

Tiuj Budaaj disĉiploj, kiuj forlasis la izolajn vivon de post la eksplodo de ĉin-japana milito konsistas el du grupoj. La unua de 85 Hankow monaĥoj veturis por Hsuechow fronto je majo 15, dum la dua grupo de 120 anoj alveninte de Shanghai forlasis nian urbon pliposte. La tereno de ilia servo estas ĉe la milita fronto aŭ ĝuste malantaŭ la fajraj linioj, kie ili povas plenumi pli grandajn misiojn al ilia religio k elsavi pli multajn vivojn, k donis ritojn al la mortintoj.

Tiu danĝerplena misio estas pligrandigo de la militatempaj servlaboroj de Hankow monaĥoj. La Savaj Trupoj organizitaj de la monaĥoj en tiuĉi urbo estis de oktobro servintaj por porti ĉinajn vunditajn soldatojn de la stacioj aŭ kajoj al la hospitaloj.

Startis en la komenco nur dudek monaĥoj ekipitaj per dek portiloj. Dank' al la entuziasmo

de Monaĥo Ĉin Hai aŭ "Mara Spegulo", kiu estas la gvidanto de Hankow Budaista Sava Grupo, k al la financa subteno de Abato Juan Jin, prezidanto de Ĉina Budaista Asocio, kiu nun vojaĝas eksterlande por kolekti monon, la organizo disvolviĝis rapide.

La 120 monaĥoj el Shanghai riskis multe en la savlaboro laŭlonge de Nanking-Shanghai k Shanghai-Hangchow-Ningpo Fervojoj, kiam la milito estis je la plej alta tajdo sur la orientaj frontoj. Ilia mema sekureco estis kalkulata nulo, kompare al la sankta tasko por savi la homamasojn—soldatojn k civilulojn—for de la militaj suferoj.

Laŭlonge de Nanking-Shanghai k Shanghai-Hangchow-Ningpo Fervojoj la postsignoj de milito ankoraŭ restis kvankam la batalo jam moviĝis alien. Tiam estis du grandaj unuoj de la Shanghai Budaistaj Enterigaj Grupoj streĉe okupantaj sin pri la enterigo de miloj da kadavroj de ĉinaj soldatoj k civiluloj, kiuj estis putriĝantaj k bredantaj la peston ĉe tiuj du fervojoj.

Tiuj grupoj ankaŭ en Shanghai enterigis kadavrojn de japanaj soldatoj. Ili starigis lignajn tabuletojn kun la nomoj de ĉinaj aŭ japanaj soldatoj antaŭ la tomboj, k kantikas al la mortintoj de ambaŭflankoj. Kelkfoje monaĥojn japanajn ankaŭ ekspedis la japana milita ĉefkomandejo por partopreni en la ceremonio.

La 120 monaĥoj nun en Hankow formis sin en du unuojn de Shanghai Budaista Sava Grupo. Ili alvenis en Hankow en januaro, ĉar tiam jam ne plu necesis la savlaboro sur la evakuita orienta fronto. En la pasintaj kvar monatoj ili servis kiel homportistoj havantaj sub sia dispono 16 portilojn. Kun tiom da instrumentoj, sufiĉa kvanto da bandaĝoj k unua-


vicaj provizoj, ili bezonas ankoraŭ kvar ambulanceojn antaŭ ol ili povas starti al la milita fronto. Ili samtempe esperas ke antaŭ ilia forlaso oni mobilizos en Hankow plian Enterigan Grupon el 60 monaĥoj.

La monaĥoj el Shanghai estas nun antaŭ la sojlo de alia entrepreno. Ili esperas ke baldaŭ efektiviĝos la Budaista Hospitalo en Hankow. Monaĥo Tai Ŝu, unu el la eminentaj Budaistoj en Ĉinio k la fondinto de la Ĉina Budaista Asocio estis invitita zorgi pri la tuta afero.

Por havigi la monon por la hospitalo k ambulanceoj, ili planis okazigi gigantan religian ceremonion por honorigi ĉinajn milit-mortintojn en la Naŭ Lotusoj Templo en la okcidenta antaŭurbo de Hankow, kie estas la ĉefoficejo de Shanghai Budaista Sava Grupo.

En la daŭro de sep-taga Religia Ceremonio por enĉieligi la animojn de ĉinaj batalherooj de Akvo k Tero kiel estas nomata, oni esperas kolekti \$4,800 en 48 preĝoj.

—E. TIBU



Ĉinaj gejunuloj gluas afiŝojn.

Ni havas ĉi tie kvin rifuĝilajn tendarojn k sep usonanojn. Por ĉiu tendaro ĉiam restas unu el ni. La doktoro k mi servas laŭbezono. Ĝis hodiaŭ forestas batalo en la urbo. Sed ekstere ĉirkaŭ la antaŭurboj proksime al du riveroj aŭdiĝas intermite la pafoj. Plejfoje la grandaj kanonpafoj rememorigas min pri la tempoj kiam la usona mararmeo ekzercas pafadon sur la pacifika oceano. Estas grandaj bruoj k la fenestroj krakis, sed neniu el ni estas vundita. Efektive mi ne timas samkiel mi ne timis en tertremo k pafekzercado en Usono. La aeroplanoj ne plu estas danĝeraj al ni, ĉar ni scias ke ili ne bombos sian propran armeon en la urbo. Mi nur timas por kelkaj rifuĝintoj, kiujn oni povus forkonduki eksteren k pafmortigi en ĉiu minuto—sed tio ne okazis, ĝis nun!

Ĉar estas nenia pli bona rimedo por pasigi la liberan tempon krom viziti nin por "esplori", la sunradioj estas konstante ĉe ni. Sed ni ja absolute havas nenion esplorindan ekcepte nian institucion. Hordoj post hordoj alvenas—bonaj malbonaj, k indiferentaj: Kelkaj cedeme vagas kien vi direktas; kelkaj volas precipe kaŝesplori malantaŭ la fermitaj pordoj, sed haltas kiam vi svingas vian manon k diras "ne". Kelkaj persistas je la esploro tute neatentante kion vi diras aŭ faras. Ĉe la pordo de la virina hospitalo ni diras al ili ke tiu ĉi loko estas ne publika al vizitantoj (plejfoje per gestoj, sed kelkfoje per ĉinaj skriboj). Kvankam malmultaj konas la anglan aŭ ĉinan lingvon, sed ŝajnas esti sufiĉa por la komprenigo la ĉina skribo; sed ili povas viziti la viran hospitalon trans la strato. En la vira hospitalo ni diras al ili ke ili plej bone ne eniru en la lokon kie kuŝas la pacientoj, sed supreniru al supra etaĝo, k ni montros al ili la X—radian ĉambron ktp.

Ili plejparte restas ekstere, similas al la grandaj buboj en kolegioj, petolantaj. Ni ŝercas kun ĉi mi flirtas kion mi neniam faris antaŭe. Ni skribas niajn nomojn unu al la aliaj en la malgrandaj libroj, kiujn ni kunportas. Okaze ĉi volas lerni kelkajn anglajn parolojn, tiam unu el ni demandas al li pri la rimedo alproksimiĝi al la majoro por la arango de manĝaĵo por la rifuĝintoj. Sed ĝis nun ni ne renkontis gentilhomon! Malgraŭe, ni konas lian nomon, k kelkfoje, kiam ni uzas ĝin, ni sukcesis deteni

kelkajn el la vizitantoj ekster la domo.

En unu ĉambro staras piano, kelkfoje la enloĝanta misiistino estas dovigata ilin gastigi. Laŭ sia konfeso, ŝi ludis malmulte, k energie elektis la plej simplajn. Iam ŝi provis kanti por ili (ŝi estas preskaŭ 50 jaraĝa), kiam ŝi trovis eventuale la selekton, kiel: "Mi miras se ili estas pensanta pri mi en hejmo!" Hieraŭ sia selekto estis "Mi laboris ĉe la forvojo." Alia invitas ilin eniri en ŝian ĉambron k trinkigas ilin per teo, lasante ilin fumi cigaredon kiam ili tion faras (!!), k amuzas ilin fonografe. Mi ĵus liberigis el ŝia ĉambro. K aŭskultiĝas la ĝazbanda muziko kiun ŝi elektis por ilin distri. Ekzakte tie bruas kiel en iu triaklasa drinkejo. Sed tio povas deteni efike ilin for de la lokoj kie la rifuĝintoj kaŝis siajn porkojn k kokidojn!

Efektive, plejparte de ili volas kondukti plej bone kiel eble! Mi pensas ke ili estis irigataj ĉi tien k ne scias pro kio ili batalas. Multaj diras papage: "Ni ne batalas kontraŭ ĉina popolo; ni nur batalas kontraŭ la komunismo." Okaze kelkaj volas diri: "Ni volas protekti ĉinan popolon". Hieraŭ kelkaj alvenis al ni k proklamis ke paco k prospero devas esti ĉi tie, pro tio komercistoj devas remalfermi siajn butikojn k la kamparanoj devas daŭrigi siajn laborojn.

Sed kune kun ĉiuj tiuj diroj, multnombro da niaj civitanoj estis aŭ pafmortigitaj aŭ pikvunditaj ĝis morto pro ne pli bona kialo ol ke ili iom prokrastas malfermi la pordon aŭ oferi ian ŝarĝaĵon. Aŭ eble ili intencis rezisti la atakon al sia edzino aŭ filinoj, aŭ eĉ, ili estis nur senkulpaj preterpasantoj hazarde dum la ĝustatempo de ilia atenco al virinoj publike! Aŭ, eble, ili havis certan eikatron kiu povas evidentigi (?) ke ili iam estis soldatoj—kelkfoje eĉ la vakcina eikatro sufiĉas por tia pruvo!—Aŭ ilia kulpo nur esti ke ili ne sukcesis trovi iun kiun niaj sunradioj persekutis. Paro da maljunaj geedzoj estis servintaj ĉe ili. Sed la edzo eskapis k ni vidis du sunradiojn trenis la virinon tra la stratoj por serĉi la edzon. Ŝi aspektis iom indiferenta dum ili iras de loko al loko. Tuj baldaŭ, ni aŭdis pafon de la ŝtatekstremito—do, ŝi ne plu povas servi por ili nun! Ili publikas al la mondo ke ili estas protektantaj ĉinan popolon. Eble nur tiuj, kiuj diras tion, pensas ke ili estas. Sed mi volas

scii kiel ili kalkulas pri ĉiuj tiuj mortigitoj!

Alia ridinda afero okazis hieraŭ! Nin vizitis grupeto da "altaj ranguloj"—paro da doktoroj, paro da raportistoj, tre interesaj junuloj kiuj povas paroli angle sufiĉe bone, garditaj de flosoj da soldatoj, k kelkaj aliaj, kiuj evidente estas oficiroj. Ni montris al ili kion ajn ili volis vidi en la hospitalo, k interparolis multe da priprofesiaj aferoj kun ili (kiel eble plej multe kiel nia limigitaj lingvo permesas). Ili rapideme skribis kelkajn notojn, trinkis nian teon, k fumis en nia kapelo! Ĉio estas en bonaj kondiĉoj. Kiam ili nin forlasis, ili des pli urĝis ke ni ĉiuj iru al la knaba lernejo por preni fotografon. Tie ili instigis al ni svarmigi aron da geknaboj, k pozis por du bildoj kiujn la raportistoj volas preni. Nu, la konsekvenco povas esti en multaj gazetoj, kiuj portas la novaĵojn pri sunradioj, publikigis la bildoj kun la titoloj de—"La usonaj misiistoj bonvonigas Armeon. Armeo protektas knabojn."

Nun en nia korto svarmiĝas ĉirkaŭ 3000 rifuĝintoj. Tio estas vere interesa! Multaj malgrandaj industrioj ekfunkcias interne de nia pordo. Mi emas promeni ĉirkaŭe k rigardas. Ni havas multajn muelŝtonojn kiujn oni savis unu post alia de diversaj lokoj en la urbo dum la sunradioj turnas sian dorson) por fabriki farunon. Ili estas ruligataj de azenoj, bovinoj, aŭ homoj alkroĉantaj al ĝi. Antaŭ nelonge ĉi tie estas varma, sed ŝanĝis la vetero de lasta semajno k ni havis multajn pluvojn k neĝojn. La iam aminda herbejo k ĝardeno nun fariĝas malpuraj, grandaj kotaj ŝlimejoj.

Iun tagon de lasta semajno la sektoro etendiĝanta ĉirkaŭ unu mejlo da longeco en la komerca kvartalo de nia urbo estis bruligita. Ĉar en la vilaĝoj norde de la urbo estas plenigita de ĉinaj soldatoj, sukcesis ekstermi grupon da sunradioj kiuj provis transpasi la riveron. Pro tio la sunradioj decidis detru parton de la urbo borderantan la riveron por malhelpi al la ĉinoj akiri starejon por ataki la urbon. Kaŭze de tio de tagmezo ĝis mallongaj horoj de la mateno, ni rigardis domojn, butikojn (kun varojn), k unu el niaj preĝejoj cindriĝintaj en flamoj.

el angla lingvo esperantigis E. TIBU

La Agadoj de Kristanoj en la de Japanoj Okupitaj Regionoj

En la de japanoj okupitaj regionoj, kiuj etendiĝas al pli ol naŭ provincoj en Ĉinio, la standardo de Suno signifas nur subpremecon, senleĝecon k anarkiecon. Ĉie ajn la loĝantaro, estas ĉirkaŭatakata de sufero, mizero k katastrofo. Sub tiuj kondiĉoj troviĝas kristanaj laborantoj, eŭropanaj, amerikanaj aŭ ĉinaj laborantoj por mildigi la suferojn.

Laŭ la raporto de la Nacia Kristana Komisiono de Ĉinio en Shanghai, la kristanaro, en Chekiang, Anhwei, Shantung, Shansi, Hopei, Honan, Ĉarhar k Suiyuan, entute nombras 260,000 personojn. Ili kuraĝas riski sian vivon restante en la hejmo sub la dubinda protekto—neŭtraleco de la religio.

Kiangsu ĉefas en listo kun 68,000 tiaj sentimaj kristanoj, kiuj persiste restas en siaj hejmoj en la de japanoj okupitaj arenoj. Ceteraj estas dislokigitaj en ok aliaj provincoj kiel jene: 65,000 en Shantung, 50,000 en Hopei, 20,000 en Chekiang, 17,000 en Shansi 5,000 en Honan, 2,500 en Anhwei k 2,500 en Suiyuan k Ĉarhar.

Inter la vastaj popolamasoj kiuj suferis multe pro japana invado, ĉinaj kristanoj trovis vastan laborkampon. Pere de la preĝejoj, aŭ aliaj kristanaj institucioj, ili plenumis la militatempan mision por helpi al siaj milit-afliktitaj samlandanoj.

Elstaranta inter la kristanaj organizoj en la de japanoj okupitaj regionoj estas la Nacia Kristana Komisiono, kiu havas sian ĉefoficejon en Shanghai. Ĝiaj sekretarioj, konsistantaj el amerikanoj, britoj k ĉinoj, montras esceptan fervoron en la kolekto de mono en k ekster la lando por helpa celo.

Rezulte de la alvoko de la sekretarioj de N. K. K., fondiĝas en Kanado la Nacia Komitato por Helpo al Milit-Suferantoj en Ĉinio. Lastatempe ĝi sendis 20,000 kanadajn dolarojn al la Internacia Ruĝkruca Komitato en Hankow.

En Nanking, ankaŭ troviĝas fremdaj misiistoj k ĉinaj kristanoj, kiuj entuziasmas pri la moderigo de la sufero de la popolo. Estas tie pli ol 25,000 mizeruloj, grandparte virinoj k knaboj en la rifuĝulaj tendoj, kiuj konstante ricevas helpon k provizon de la kristanoj. S-ro John Magee de la Amerika Preĝeja Misio direktas la taskon de Ruĝa Kruco en Nanking.

Kelkaj el la misiistoj en Nanking eĉ deziras reformi la japanajn soldatojn. S-ro Forster de la Amerika Preĝeja Misio konstatis en sia letero, publikigita en Shanghai, dirante: "Ĉiuj specoj de malbonaj organizoj estas disponitaj al japanaj soldatoj en Nanking—kabaretoj, drinkejoj k bordejoj. La kvartalo de Tai Ping Road apud Ta Hsing Kung estas la centro de tiaj malbonoj. Post ĉiu tagmezo oni ĉiam povas vidi arojn da ebriaj soldatoj k maristoj ŝanceligitaj ĉirkaŭe. Mi volas havi la ŝancon por kontakti kun la japanaj preĝejoj k petas al ili sendi kelkajn japanajn pastrojn en la trupojn. Ili devas aranĝi diservojn aŭ instigi la soldatojn al legado, skribado ktp. Mi kredas ke tia laboro estas valora por la homoj k ankaŭ por la Imperio."

La nombro de diversaj kristanaj preĝejoj partoprenantaj en la Helpservo en la de japanoj okupitaj regionoj, laŭ la informo ke la Nacia Kristana Komisiono, estas entute 1,298. Krome, ankaŭ funkcias 86 misiistaj hospitaloj, 9 universitatoj, 22 seminaroj, 67 superaj gimnazioj k 34 malsuperaj gimnazioj en tiuj regionoj, kiuj provizore apartigitaj de Ĉinio.

—E. T.

AUSKULTU

LA RADIODISENDO EN ESP-0 EL ORIENTO

Per la Hankow Mallongonda
Radiostacio X G X

Frekvenco: 9250 kilocikloj

Ĉiusabate de 21:30 ĝis 21:45 laŭ Hankow tempo.

Japana Popolo Suferas de Milito

—Leteroj el Japanio—

La subaj du leteroj, kiujn mi esperantigis el ĉina gazeto "Fronto" estas trovitaj ĉe kadavroj de la ricevintoj, kiujn la milito forrabis por ĉiam al iliaj karuloj.

—Jezezo.

7 Novembro 1937.

Mia kara Ito:

Post longa atendo mi ĵus ricevis vian leteron. Kun ĝojo mi sciigis ke vi bone fartas. Mi restas ankoraŭ en la kafejo pasigante solecan ĉiutagon.....

Mi aŭdis lastatempe ke ĝis nun oni eldonis jam dufoje obligacion k ke mortintoj k venditoj atingis jam la nombron de 200,000. Mi estas neklera virino, mi tamen opinias ke nenion bonan donos la milito. Mortis mia frato en la Manĉuria milito, ni tamen nenion gajnis pro tio. Tion pripensante des pli mi kaptiĝis de la timo ke vin revidi mi ne povos. Se falus vi iutage en la milito, kiel mi sola povus vivi plu, mia kara?! Ĉe tiu penso ĉiufoje mi sentas mortigan kordoloron. Milito ne estas bona, ĉesigu ĝin k baldaŭ revenu! Kun arda koro vin atendas el malproksime via Joŝiko.

Mi havas monton da vortoj, sed plu skribi mi ne povas pro la nenomebla malĝojo. Do ĝis revido! Bonan sanon!

Via soleca Joŝiko.

Mia kara filo:

Estas jam ege malvarme en Manĉurio k

ĈINIO NE ESTAS KONKEREBLA

Ĉi-sube estas la parta traduko de la taglibro, trovita en la mortinta korpo de la japana aera piloto Saburo Kobajashi.

Novembro 14 (1937): La Kato Skadro hodiaŭ akceptis min kun malĝoja silento, kiam mi min montris por pleniĝi la valantan lokon forlasitan de Nagamura. Li estis knabo 22-jara k renkontis sian morton kiam lia aeroplano bruliĝis dum aerbatalo super Anyang, en Norda Ĉinio.

Kapitano Kato aspektas tre serioza pri ĉio. Lia haŭto estas kuprokolora k liaj okuloj estas malgrandaj, tamen akraj. Li estas la sola persono en nia skadro, kiu ankoraŭ subtaskas la batalpovon de la ĉina aera armeo.

Marto 1 (1938): Ni havis hodiaŭ teruran batalon kun la ĉinoj super Loyang. Kapitano Kato multe eksciigis k volas sendi batalinviton al la ĉina aerarmeo por alia aerbatalo. Sed mi ne povas tiel facile preni la aferon, ĉar mi kalkulis kvardek tri kuglotruojn en mia aeroplano. La ĉinaj pilotoj estas surprize kuraĝaj. Kiam ili ne povas gani avantaĝon en alia rimedo, ili direktas sian aeroplanon kontraŭ nin per plena rapideco. En la batalo kun la ĉinoj, la plej grava afero estas konservi certan distancon de ili.

Multe da malbonaj novaĵoj venis antaŭ nelonge. Hiroshi Miwa estas mortigita en Shansi. Ankaŭ la mararmea skadro suferis pezan perdon. La tutlande konata "Ruĝa Militisto" Kolonelo R. Shioda estas mortigita en Nanchang. Kaneko estas pafita dum aeratako en Hankow la 18an de februaro. Dume Kurimoto perĉiĝis k ankoraŭ ne troviĝis. Kelkaj de la plej bonaj batalantoj en la Imperia Aera Armeo, kiaj Kotani, Tanaka, k Nagada estas ĉiuj oferitaj en ĉi batalo kontraŭ Ĉinio.

Marto 22: Malbonaj novaĵoj venis tro ofte. Unu el niaj divizioj estas sieĝita en Lin-i. La ĉinaj aeraj skadroj venis en grandaj nombroj por bombi niajn poziciojn k la Kato skadro estas ordonita al Shantung por helpi al niaj trupoj. Ni drinkis iom da vino dum vespermanĝo, k Kapitano Kato deklaris:

—Nun ni havas la okazon batali la plej bonajn ĉinaj skadrojn, ni devas detruji ĉiun maŝinon kiun ili sendas kontraŭ ni.

Ni ĉiuj kantis k multe drinkis.

Marto 24: Ni hieraŭ venis al Tsinan, la provinca ĉefurbo de Shantung, k sciigis ke la afero estas multe pli severa ol estis raportita. Vespere, Kapitano Kato diris al ni ke la tempo

Norda Ĉinio laŭ ĵurnalo, vi do certe suferas pro la servo en la fronto. Ĉu ne?

Pro la milito multaj eksciigitaj soldatoj estas vokitaj. Nun estas la triafoja mobilizo. Iris jam Keiĉiro el Izuzaki k Nagai el Jamada, la ĉarpentisto. Milita atmosfero nun regas en Japanio, k ĉies koron ĝi streĉis. Sed aliflanke estas tiaj personoj kiuj forkuris pro abomeno al la militservo k estas mort-pafitaj de la ĝendarmoj. Baldaŭ post via foriro, eĉ nia ĉevalo estas forprenita por ke "ĝi militservu al la nacio" laŭ ilia esprimo. Tio donos malfacilon al ni dum la venonta rikolto. Oni prenis mian solan filon k mian solan ĉevalon, kian suferon ĝi kaŭzis al ni malriĉuloj!

Sed la filoj de la burĝoj ankoraŭ ĉiuboĉas kiel kutime en dancejo k kafejo, tion vidante mi trafis ĉiufoje en flaman indignon!

Estas venkoj post la militeksplozo, ni tamen ne povas kalkuli la grandegan koston jam pagitan—multege da mortintoj. Ĵurnaloj informas ke industriistoj k kapitalistoj rapidas etendi sian entreprenon en Norda Ĉinio, tiu fakto sola sufiĉas klarigi: por kiuj estas la milito.

Vi eble nomus min obstina patro pro la supre diritaj, sed estas ne eble por mi imiti tiajn hipokritajn patrojn kiuj kvazaŭ kun ĝojo sendas sian filon en inferon. Ĉiokaze, estas bone se vi revenos sekura. Gardu vian sanon dum la malfavora sezono!

Via patro.

fine venis al ni por fari decidan batalon kun la ĉina aerarmeo.

Marto 25: Ni ekflugis ĉe tagiĝo al la ĉina aerodromo en Kweitch. La aeroplano de Kawahara sur kies flugilo estas markita ke ĝia piloto jam detruis ses maŝinojn, flugas dekstro de la mia. Tiu de la Kapitano Kato estis en la gvido. Super nia skadro estas la Teranisi Skadro. Ankoraŭ supere estis la Nagahira Skadro.

Ni alproksimiĝis al Kweitch aerodromo, kiam tute subite la malamikaj ĉasmaŝinoj atakis. Ni disigis la vicon por ilin renkonti. La aliaj du skadroj ankaŭ partoprenis la batalon. Tuj la ĉirkaŭ sepdek aviadiloj de ambaŭ flankoj batalis en malgrandaj grupoj. Post dek minutoj ĉiu flanko suferis perdon. La densa fumo en la nuboj montris ke estis sufiĉe multe da viktimoj.


Tute subite la aeroplano de Kawahara bruliĝis k falis kiel terĉo. Ni kviete forkuris k revenis al nia bazo. La Kweitch aeratako estis fiasko.

Vespere Kapitano Kato sidis sola kun malĝojo. Lia plej fidita leŭtenanto Kawahara mortis; k ankaŭ leŭtenanto Fujijama k ankoraŭ kelkaj aliaj kolegoj. Restis nur iom el la antaŭa fieraj Kato Skadro. Je iu distanco, Piloto Nigawa rigardis la kapitanon en kolera silento.

Aprilo 10: La malĝojo de la Kapitano Kato post la morto de siaj amikoj devas esti la kaŭzo de lia propra morto en nia dua atako al Kweitch.

La terura ideo ke Ĉinio ne povas esti konkerrita trakuris la korojn de la japanaj soldatoj k eĉ la aerarmeo venos sub la influo de tia danĝera penso.

—Trad Tank.



Ĉinaj gejunuloj faras propagandan paroladon.

C. MAR

EN JAPANA POLICEJO

(fino)

Mi estis kondukita al la "porkejo" en la subteretaĝo de la policejo. Enirinte la malluman pordon, mi ekstermis pro la atako de la malvarma aero tie. Ĉi tie ne estas printempo, nek somero. La gardisto venis traserĉi min. Post tio li enpuŝis min al unu el la staloj de la "porkejo".

La ejo malantaŭ la ferpalisaro, kie mi restas, estas tre malgranda ĉambro. Tri metrojn longa kaj du metrojn larĝa. Tamen ĝi entenis ses homajn estaĵojn. Estas malgranda truo je la supro, kiu enlasis kelkajn striojn da lumo. Rigardinte la truon por momento, mi ekspiris, pensante, ke mi nun vere ekvivis en malliberejo, tian vivon mi neniam spertis antaŭe.

Estis entute ses kunsuferantoj en la ĉambro; unu el ili estis korea gimnaziano kiu venis ĉi tien pro "sekskrimo" al japana virino, kun kiu tiu kompatinda knabo havis "amaferon". Li estis tre afabla al mi. Tre ĝentile li ŝparis malgrandan lokon al mi por sidi. Dankeme premante lian manon, mi ekkonversaciis kun li:

"Hej, amiko, kiom longe vi devus resti ĉi tie?"

"Tri jarojn."

"Ĉu via afero estas tiel serioza?"

"Ne, sed la japana polico konsideras tion tre serioza."

"Ĉu viaj familianoj scias vian aferon? Eble ili povas laŭpove malliberigi vin."

"Ili ne scias, ĉar ili estas en Koreio. Kaj, kaj... Ĉi tie la knabo ne povis fini la frazon. Mi vidis, ke en liaj okuloj brilas larmo.

Kaj ni silentis.

La tago en la malliberejo estas terure longa. Ses tagoj pasis trankvile, pasis kiel ses monatoj. Je la sepa tago oni vokis mian nomon ekster la pordo. Mia korea amiko tiris min je la kubuto: "Jen vi havas, la prokuroro volas vidi vin."

Malalta grasulo kondukis min al la surtera etaĝo. Ni eniris luman ĉambron, kie sidis sinjoro la rondventra ulo kiu antaŭfoje ekzamenis mian aferon. Kaptante la vidon de mia figuro, li ekridetis, demandante:

"Kiel vi fartas?"

Li bone komprenis, ke mi ne povas elteni la vivon en japana malliberejo, kie la aero kaj la manĝaĵo estis tre malbonaj.

"Vi," li aldonis, "ĉifoje vi devas diri la veron. Alie ni neniam liberigos vin."

Kaj li montris al mi amason da leteroj demandante: "Kiu ilin skribis al vi?"

"Mia amiko."

"Kiu li estas?"

"Sro J."

"Hm," kaj li kapjesis.

"Kio estas ĉi tio?"

"Tio estas leteroj de mia amiko B."

"Kie li nun estas?"

"En Hispanio."

Refoje li kapjesis. Li ne parolis. Silento regis la ĉambron: La malalta prokuroro ne plu parolis. Li enpenseme rigardis min per siaj malgrandaj okuloj por momento. Kaj li ekstaris kun la valizo en la manoj; li volis foriri.

"Vi," li fine parolis, "vi estas popol-frontano."

Kvazaŭ histeria rato li urĝe foriris. Mi ekkonfuziĝis. Li difinis min kiel "popol-frontanon, sed ne diris la kialon. Ŝajnis al mi, ke tiu malaltulo ankoraŭ posedis multajn misterajn demandojn.

Tiun nokton mi sentis min tre soleca en la malliberejo. Ranoj harmonie floris ekstere. Mezsomera venteto foje enmigris tra la truo de la supro de la ĉambro. Mi neniel povis dormi; min ekatakis la nostalgio.

Ĉar li jam difinis min kiel "popol-frontanon," nun la malaltulo ekexploris min laŭ tiu direkto. Li insistis, ke mi almenaŭ iel rilatas al la hispanaj popol-frontanoj, se mi ne estus komunisto. Lia rezono estis, ke se mi ne estis popol-frontano, mi ne devas amikiĝi kun s-roj J. Kaj B.

Sro J. estas maljuna espisto japana, kiun mi konis nur post kiam mi venis al Japanio. Li

estas bonkora samideano. Lastan aŭtunon li sendis malgrandan sumon da mono al la respublika registaro de Hispanio kaj la afero estis raportita al la polico japana de l' poŝtoŝicejo. Eksciiginte ke mi estas lia amiko, la japana polico konkludis, ke mi ankaŭ havas parton en la sumo.

Koncerne mian rilaton kun Sro B. la japana polico ankaŭ kredis, ke mi nepre estas popol-frontano. Sro B., angla juna poeto, estis mia instruisto. Li vojaĝis al Hispanio en lasta februaro kaj mortis en junio lastjare proksime de Madrido. Li skribis al mi pli ol tridek leteroj. Jen la japana polico rigardis ilin kiel atestaĵojn de mia "krimo".

"Se vi ne konfesas la aferon," la malaltulo minacis min, "vi neniam povos eliri tiun ĉi policejon".

Ŝajnis al mi, ke la japana polico vere volis teni min en la malliberejo, ĉar la japanoj jam komencis militon en norda Ĉinio. Ĉiu ĉina junulo revenanta al Ĉinio kompreneble partoprenas la anti-japanan rezistmiliton.

Ree semajno pasis. La afero ankoraŭ restis ne solvita. Cetera la malalta prokuroro plue esploris multajn suspektindajn dokumentojn el gazetoj kaj ĵurnaloj kiuj atestis mian "krimon". Ekzemple en la franca gazeto "Vendemaire" kiu mi posedis, oni eltrovis artikolon titolita "Japon au turnée," verkita de iu sinjoro sub la nomo Simon. La japana polico diris, ke tiun artikolon mi verkis. Mi neis, rezonante, ke mi ankoraŭ ne povas verki en la franca lingvo. Tiam la polico ŝanĝis la opinion, konstatante, ke mi legis tian artikolon kun la celo, ke mi utiligos ĝin kiel materialon por mia anti-japana propagando.

Sammaniere la japana polico eleitis kelkajn frazojn el la leteroj, kiujn miaj amikoj en Ĉinio skribis al mi, kiel atestaĵojn de mia "danĝera ideologio". Ĉia mia pledo estis vana, ĉar la malaltulo, kiu nun "ekzamenis" la aferon, tute ne ŝatis logikan traktadon.

Ree semajno pasis kaj venis nenia konkludo. Mi jam fariĝis iom malsana. Kaj la plej abomeninda afero estas, ke ekatakis min neŭrasteno. Cetera la cimoj en la "porkejo" tro abundas. Neniu povis bone dormi eĉ por unu horo.

"Sinjoro" mi kriis al la malalta prokuroro, "Kia devas esti la rezulto? Mi jam ege malsanas."

"Hm" la rondventra malaltulo kuntiris la brovojn, farante tre ĉagrenitan mienon. "Vi estas tro bagatela ulo. Vi diris nur sensencaĵon kaj nenian veron. Kial mi povas konkludi la aferon?"

Kaj li silentis por momento, frotante siajn okulojn kaj elspirante veon. Post tio li ekstaris kiel histeriulo. De la muro li deprenis la bambuvergon.

"Vi ĉinaĉo!"

Jen li ekbatis min je la kapo. Baldaŭ mi perdis konscion. Mi ne sciis, kiam mi estis portita al la subtera ĉambro. Kiam mi povis senti la doloron je la korpo, jam estis mez-nokto.

Kiam mi revidis iutage la rondventran prokuroron en la ĉambro de la surtera etaĝo, li jam ne estis tiel kruela. Li hipokrite ridetis kaj demandis min: "Kiel vi sentas ĉi tiujn tagojn?"

Li ne plu insistis demandi, ĉu mi estis internacia popol-frontano aŭ ne. Li nur demandis, kioman aĝon mi havas, kiaj estas mia familiaj kondiĉoj, en kiuj lernejoj mi estis, kiajn librojn mi legis, kaj kiel mi rigardas la mondon. De tio li faris konkludon pri mia "ideologia evoluo".

Tio estas lia raporto al la Tokia Ĉefpolicejo. Kaj tute sen mia konsento li faris konkludon al la raporto, kiu certigis mian "krimon". Kelkaj konkludoj kiujn la rondventra prokuroro faris, estas tre interesaj. Ekzemple sub la titolo: "rilato kun japanoj", la konkludo estas jene:

Demando (de prokuroro): Vi konas tiel multe da japanoj. Ĉu vi celas ilin por fari grandskalan anti-japanan movadon?

Respondo (de akuzato): Jes, mi havas tian intencan. Sed la intencan ankoraŭ ne povas efektiviĝi pro tio, ke mi estas nur nova vizitanto al Japanio, ankoraŭ ne bone sciante la kondiĉojn de japana socio.

Tian respondon la malaltulo mem faris por mi.

La raporto fariĝas libreto de ĉirkaŭ kvardek

Orfigita Knabo de Japana Aeratako

"Usonan militŝipon bombas japanoj" kriegis Yao Hsi-Tsun, 12-jara ĵurnalo-vendisto, dum li kuris tra la stratoj de Hankow vendante ĵurnalojn ĵus aperintajn.

Malgranda Yao prikritigis novaĵojn pri la kruelaĵoj de japanoj presitaj en ĉinaj ĵurnaloj per pli alta voĉo ol la aliaj ĵurnal-vendistoj, ĉar tio restas por li la sola rimedo por venĝi la mortigon de siaj patrino kaj junfrato al la japanaj bombistoj.

Kelkfoje li petis soldatojn lin preni al la milit-estraro por enviciĝi en la armeon por kontraŭbatali japanojn, sed ĉiufoje li malsukcesis, ĉar li estas tro juna por preni pafilon.

La malgranda knabo nun vendanta ĵurnalojn en la fremda urbo estus ankoraŭ en lernejo en Nanking, se ne venus la japanaj invadantoj. Neniam li povas forgesi tiun daton, kiam li estis detenata en lernejo dum manĝtempo de la aero-ataka alarmo. Restante en lerneja kontraŭ-bomba-ŝirmejo kiam japanaj aeroplanoj zumadis en la aero k bruas la pafoj de ĉina anti-aera kanono, li estis pripensanta siajn patrinojn kaj junfraton k seivolis, ĉu ili estas sendanĝeraj.

La aer-atako finis post horo k duono kaj Yao tuj rapidis hejmen. Sed la patrino, kiu kutime lin bonvenis ĉe la pordo, ne estis tie. Nek ŝi estis ie en la hejmo—ŝi kaj la junfrato.

Granda homamaso kolektiĝis ne malproksime de lia hejmo. La sceno tuj tiris atenton de la knabo kaj tien li kuregis kaj kriegis. Li faris vojon en la amaso kaj vidis dismembritajn partojn de homaj korpoj disĵetitajn sur ruinaĵoj de iu apudvoja anti-bomba-ŝirmejo, kiu suferis rektan atakon de japanaj bombantoj.

Inter la kadavroj fine Yao trovis tiun de sia patrino, kiu protektante sian fileton estis mortigita. Unu el ŝiaj brakoj estis frakasita; la alia ankoraŭ kaptanta infanon. Malgranda Yao ne povis tiam rekoni la korpon de sia patrino, escepte sian frateton falintan en eterna dormado, kies kapo fariĝis mortpala, malbelega kranio.

La loko estis plenigita de plorado kaj kriego, kaj inter la amaso de la lamentantaj homoj estis malgranda Yao, ploranta plej kortuŝe tenanta la korpon de sia patrino.

"Mi volas mortigi ĉiujn japanajn aero-akantojn kaj soldatojn por venĝi la murdon de miaj patrino kaj junfrato", li kriegis.

Forkurinte al Hankow sub la protekto de parencoj post perdo de Nanking, malgranda Yao ofte kalkulas la datojn, kiam li plenkreskos kaj estos kapabla preni pafilon por kontraŭbatali japanajn invadantojn.

Esp-igis Ĉoĉa.

NI DANKE KVITANCAS

	resp. kuponoj
S-ro Thia-Hoi—Indochine	3
„ Tran-Van—Indochine	3
Dipl. Ing-Paul Tarnow—Germanio	3
S-ro J. M.—Nederlando	4
Lab. Esp-Asocio—Gablonz de CSR	4
S-ro Jan Bobelt—C. S. R.	1
„ K. Kulomaa—Finlando	4
„ Leo Suonpaa—Finlando	4
„ Oskar Tokimen—Finlando	4
S-ino A. Faure—Francio	4
S-ro Rouviere Paulo—Francio	1
S-ro E. Lentz—Britio	4
„ H.H. Molenaar—Nederlando	9
„ G. S. Edberg—Svedio	4
„ E. Schmit—Francio	4
„ Sven Utberg—Svedio	4
„ A. Rossing—Nederlando	4

adm. de V. el O.

paĝoj. Kaj tri tagojn estis uzitaj por ordigi ĝin.

"Jen vi povas eliri, sed ne diru, kiel oni traktis vin ĉi tie." La malaltulo diris.

Aŭdinte la vortojn mi ne sciis, ĉu mi devas ĝoji aŭ ne.

